


ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto



Ĉi-numere legu pri:
PAŜOJ AL SOLENADO DE LA CENTJARIĜO
HARFENDADO PRI LA JUBILEA SIMBOLO
KIO NOVAS EN TEJO?
NIAJ UNUAJ FERIOJ PER
PASPORTA SERVO
SEPTEMBROFINE ĈE ZLATA NANIĆ
HIROŜIMO kaj VUKOVAR

4

2007

Eldonanto:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr

**Ĉefa kaj respondeca
redaktoro:**

Radenko Milošević
Goljak 43, HR-10000 Zagreb
Kroatio
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redakcianoj:

Marica Brletić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Ple-
adin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (janu-
aro, marto, majo, julio, sep-
tembro kaj novembro). En
2008 aperos ses numeroj.

Jarabono por 2008:

en Kroatio: 75,00 kunaŝj
al ĝirkonto de "Grafokom"
2360000-1100925404
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: plea-k

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

RESUMO

Promesite-farite! La lasta ĉi-jara numero de "Zagreba Esperantisto" troviĝas en viaj manoj. Ĝi alportas al vi multajn novaĵojn kaj pripensendaĵojn! Ju pli ni progresas en la aperritmo, des pli venadas postuloj ŝanĝi la nomon de "Zagreba Esperantisto", ĉar "ĝi multe transpaŝas la landlimojn de Kroatio", kiel diris unu el la legantoj. Ĉu vi samopinias? Se ankaŭ vi postulas la ŝanĝon, kian titolon vi proponus? Dividu viajn pensojn kun la redakcio!

Ekde 2008 ni komencas batalon por ĉiu nova abonanto. Tiucele nia revuo jam aboneblas tra Universala Esperanto-Asocio kaj pere de "Orbis Pictus". Diferencas efektive nur du abonoj: la enlanda kaj la eksterlanda. La enlandaj legantoj ĉi-numere ricevis ankaŭ pagilojn, per kiuj oni facile direktas la pagojn al la enlanda konto de la eldonanto. La eksterlandaj klientoj uzu la servon de UEA aŭ Orbis Pictus, aŭ pagu rekte al nia konto ĉe UEA: plea-k la sumon de 15,00 eŭroj por 2008. Gravus, ke vi abonigu aŭ instigu aboni ankaŭ viajn kolegojn, amikojn, konatojn, ĉar kun atingotaj 300 abonoj, ni povos sen subvencioj funkcii en akurata ritmo. Unu el nia legantoj skribis al ni: "Ni devas ĉiuj subteni la entreprenon de Zagreba Esperantisto, ĉar tiel kvalitan gazeton ni havis neniam antaŭe en nia historio en Kroatio". Pola radio taksis nin jene: "Estas afero neniel duba, ke dank' al 'Zagreba Esperantisto' sur nia revumerkato aperis vere leginda periodaĵo estanta grava informilo pri tiulanda lingva komunumo." Memoru, ke en 2008 atendas nin - 6 numeroj - do preskaŭ 200 paĝoj da legindaj tekstoj!

Pri la plej gravaj temoj de aktuala momento en Esperantujo, legu en la sekvaj paĝoj. Ni menciis nur, ke enlande okazis du gravaj eventoj: 1) prezidento de Kroatio, s-ro Stjepan Mesić akceptis aŭspicion de la Centjarigo de la enlanda movado, kaj 2) la zagreba Filozofia Fakultato faris decidon pri kunorganizado de simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" en la jubilea jaro. Ni traktas temojn de jubilea UEA-simbolo kaj volapuka Vikipedio, kiuj forte tremigis la konsciencon de esperantistoj tutmonde. Ni publikigas plurajn raportojn el landaj kaj internaciaj kongresoj kaj aranĝoj kaj prezentas mallongajn informojn el ĉiuj meridianoj. Ne mankas literaturo Esperanta, recenzo, tradukoj tute nekonataj ... Omaĝe ni publikigas artikolojn pri du milite detruitaj urboj, Hiroŝimo kaj la kroata Vukovar. Ni mencias niajn renkontiĝojn kaj ideojn, diskutojn kaj disputojn ... ĉion cele al konkorda kunvivado en Esperantujo. Ni iru serene al nova jarkolekto 2008!

La redaktoro

PAŜOJ AL SOLENADO DE LA CENTJARIĜO



PREZIDENTO DE KROATIO, s-ro STJEPAN MESIĆ, AKCEPTIS AŬSPICION DE LA CENTJARIĜO

Prezidento de Respubliko Kroatio s-ro Stjepan Mesić, lundon, la 15-an de oktobro ĉi-jare akceptis prezidanton de la Organiza komitato por soleni Centjariĝon de Esperanto en Kroatio, s-ron Radenko Milošević. En amika kaj agrabla te-kafa interparolo ili rememoris pri la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Zagrebo en la jaro 2001. La prezidento estis informita pri atingoj kaj gravaj eventoj de kroaciaj esperantistoj dum la pasintaj cent jaroj kaj pri agado rilate al solenado de la Centjariĝo sekvontjare. Li ricevis la ĝisnunan materialon rilate la feston kun tiucela afiŝo. Samtempe li trafolumis la tri aperintajn numerojn de “Zagreba Esperantisto”, interesiĝinte pri unuopaj tekstoj.

La prezidento akceptis ĝeneralan aŭspicion de la Centjara jubileo en Zagrebo, promesinte partopreni ĉe la internacia simpozio “Esperanto kaj kroata kultura identeco” en oktobro 2008 kaj ĉe solena kunsido de KEL en decembro sekvontjare.

SIMPOZIO “ESPERANTO KAJ KROATA KULTURA IDENTECO” ORGANIZOTA EN LA FILOZOFIA FAKULTATO EN ZAGREBO

Velimir Piškorec

Okaze de centjariĝo de la organizita nacia Esperanto-movado en Kroatio, Kroata Esperanto-Ligo kaj Filozofia fakultato de la Universitato en Zagrebo organizos la 7-an kaj 8-an de novembro 2008 internacian fakan kaj scian simpozion titolitan *Esperanto kaj kroata kultura identeco*. La organizantoj intencas inviti prelegantojn kiuj pritraktos kvar ĉefajn temarojn – unu ĝeneralan kaj tri specifajn. Kadre de la ĝenerala temaro oni parolos pri diversaj aspektoj kaj problemoj de nuntempa internacia komunikado tuŝante ankaŭ Esperanton kiel eblan solvon. Prelegoj kadre de aliaj tri temaroj rilatos al:

1. historio de Esperanto en Kroatio, 2. rolo de

SVEUĈLIŠTE U ZAGREBU
FILOZOFSKI FAKULTET
Zagreb, Ivana Lučića 3

KLASA: 053-01/07-017435
URBR J: 3804-850-07-2
Zagreb, 26. rujna 2007.

Na temelju članka 22. Statuta Filozofskog fakulteta i mišljenja Dekanskog kolegija dekan dorosi sjedeću

ODLUKU

Priliva se pokroviteljstvo i zajedno sa Hrvatskim savezom za esperanto suorganizacija međunarodnog znanstvenog skupa „Esperanto i hrvatski kulturni identitet” koji će se održati 7. i 8. studenoga 2008. godine u Vijećnici Fakulteta.



DEKAN:

Dr. sc. Miljenko Jurković, red. prof.

Dostaviti: prof.dr.sc. Damir Boras
2. tajnica Dekana
3. upraviteljica zgrade
4. pismohrana

Esperanto kiel pontolingvo por prezentado de kroataj kulturaj atingoj eksterlande kaj 3. agado de kroataj esperantistoj sur la ne-esperantisma kampo. Oni esperas, ke la simpozion partoprenos duedeke da invititaj prelegantoj – kaj esperantistoj kaj neesperantistoj. La listo de prelegantoj estos konata komence de 2008 ĝis kiam oni esperas ricevi definitivajn konsenton de la invititaj fakuloj.

Prezidanto de Respubliko Kroatio, sinjoro Stjepan Mesić, jam bone konata apoganto de aktivecoj de kroataj esperantistoj, konsentis transpreni altan aŭspicion de la simpozio.

La simpozio havas organizan kaj honoran komitaton. Prezidanto de la organiza komitato estas **profesoro d-ro Damir Boras**, vicdekano ĉe la zagreba Filozofia fakultato por scienco kaj internaciaj rilatoj kaj estro de Katedro pri leksikografio kaj enciklopedistiko de Fako pri informsciencoj, kiu entuziasmiĝis eksciinte pri la ideo de kroataj esperantistoj organizi la simpozion, kaj esprimis pretecon aktive kunlabori ĉe ĝia efektivigo. Aliaj du organizaj komitatanoj estas **magistro Radenko Milošević**, konsilisto ĉe Kroata Ekonomia Ĉambro kaj estro de ĝia sekcio pri makroekonomiaj analizoj, kaj **d-ro Velimir Piškorec**, docento ĉe la Germana fako de la Filozofia fakultato kaj kroata UEA-fakdelegito por lingvistiko. S-ino **Aleksandra Šćukanec**, scienca novicino ĉe la Germana fako de la Filozofia fakultato, estas sekretario de la simpozio.

La honoran komitaton prezidas ano de Kroata akademio de sciencoj kaj artoj kaj honora komitatano de UEA **d-ro Dalibor Brozović**. La ideo organizi simpozion kun ĉi-tie prezentita temaro estis varme apogita ne nur de aliaj du membroj de Kroata akademio de sciencoj kaj artoj, nome **profesoro d-ro August Kovačec**,

latinidisto kaj ĉefredaktoro de la plej grava nuntempa leksikografia publikaĵo en Kroatio "Kroata enciklopedio", kaj **profesoro d-ro Mislav Ježić**, unu el la plej konataj kroataj hindologoj kaj filologoj, sed ankaŭ de aliaj du profesoroj ĉe la Filozofia fakultato en Zagrebo: **dr-ino Zrinjka Glovacki-Bernardi**, elstara kroata germanistino kaj lingvistino, kaj profesoro **d-ro Josip Silić**, kroata lingvisto famiĝinta kiel aŭtoro de gramatikoj kaj ortografiaj manlibroj pri la kroata lingvo. Unu el la plej respektindaj kroataj teologoj kaj verkistoj, **profesoro d-ro Ivan Golub** ankaŭ konsentis pri sia honora membreco rilate al la simpozio, same kiel nestoro de kroata esperantismo, **d-ro Ivo Borovečki**, emerita radiologo. Internacian esperantistan komunumon reprezentas en la honora komitato **d-ro Detlev Blanke** el Germanio, mondfama interlingvisto kaj prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik. La tuta projekto por organizi la simpozion ne estus ebla sen senhezita kaj varma apogo de la dekano de la Filozofia fakultato, fama kroata arthistoriisto, **profesoro d-ro Miljenko Jurković**, kiu disponigis la plej solenan ejon de la fakultato por okazigo de la simpozio kaj decidis ke la Filozofia fakultato organizu ĝin kunlaborante kun KEL.

Ni konkludu: la ĉefa celo de la simpozio "Esperanto kaj kroata kultura identeco" okazonta en novembro 2008 estas informi kroatian publikon pri internaciaj kaj hejmlandaj aspektoj de la historio de Esperanto en Kroatio kaj konatigi la fakton, ke kroataj esperantistoj kaj iliaj aktivecoj kaj atingoj dum la lastaj cent jaroj estis kaj estas alte aprezataj en Esperantujo. La intenco de la organizantoj estas, ke oni publikigu ĉiujn prelegojn kaj kroate kaj Esperante por ke la prezentotaj esplorrezultoj kaj studoj estu legeblaj kaj citeblaj ankaŭ internacie.

KUNLABORO KUN FILATELISTOJ EN LA JUBILEA JARO

Post la interkonsento kun Radenko Milošević, prezidanto de la Organiza komitato por soleni la Centjariĝon, s-ro **Nikola Turk** el Zagrebo transdonis mesaĝon kaj Kadran programon al prezidanto de Kroata Filatelista Asocio (=Hrvatski Filatelistički Savez, HFS), s-ro Ivan Librić, kun la celo meti en la tagordon de la unua kunsido de HFS la temon pri organizado de memorekspozicio kun la labortitolo "La plej sukcesa kaj la plej aĝa internacia lingvo Esperanto en filatelo de la 20-a

kaj 21-a jarcentoj", kiu havus kelkajn sekciojn pri poŝtmarkoj, leteroj, kovertoj. La planata ekspozicio estus prezentita en unu el tri proponitaj lokoj, kaj konsistus el 10-20 vitrinoj (100x80 cm) kun po 12 kartonoj, sur kiuj ekspozicius la membroj de HFS.

Bedaŭrinde, la kontaktoj kun Kroata Poŝto konfirmis, ke praktike ne eblas realigi aperigon de Esperanta poŝtmarko en 2008, pro la jam eldonitaj poŝtmarkoj en 1997 kaj 2001. Tamen, eldono de okaza poŝtmarko estas ebla, pri kio ni atendas subtenon de HFS por ĝia akcepto.

Kunsidis la Organiza komitato pri la Centjara Jubileo

La Komitato havis sian trian kunsidon la 18-an de oktobro 2007 en Zagrebo. En la kunsido estis pritraktitaj la ĝis nun faritaj paŝoj rilate la programon de la Centjariĝo. La komitatmembroj estis informitaj pri la aŭspicio kiun akceptis s-ro Stjepan Mesić, prezidento de Kroatio, pri la decido de la Filozofia fakultato en Zagrebo organizi simpozion, pri la planita programo en koncertejoj "Vatroslav Lisinski" ktp.




NAVIGANTE TRA LA ESPERANTA LITERATURO



William Auld

LA SENMORTA WILLIAM AULD

Antaŭ unu jaro (la 11-an de septembro 2006) forpasis la fama skota Esperanto-poeto William Auld, literatura Nobel-kandidato. Hodiaŭ apenaŭ ekzistas alia verkisto kiu kandidatus por la sama premio. Pri Auld la diversaj "partioj" de la Esperanto-movado, senescepte kongruas: temas pri evidenta grandulo de nia



literaturo, kaj lia eposo "La Infana Raso" povas esti komparata kun similaj nacilingvaj verkoj. Ne mirigas tial, ke ĝi aperas traduke en diversaj lingvoj. La retejo de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA): <http://www.everk.it> omaĝas la elstaran poeton per disponigo de nacilingvaj tradukoj de lia eposo en la skota kaj angla (trad. Girvan McKay), kaj la franca (trad. Jean-Pierre Danvy). Baldaŭ estos preta ankaŭ la hungara versio tradukita de István Ert.

Samtempe kun la datreveno de lia morto, LF-koop lanĉis la duoblan kompakt-diskon kun akompana libreto, en kiuj troviĝas teksto kaj surbendigo de "La Infana Raso", kiun William Auld mem deklamis por LF-koop. Al la realigo kontribuis meksikaj esperantistoj, speciale Jorge Monriku kaj membroj de familio Nájera. La oficiala prezento okazis la 13-an de oktobro 2007 en Berno (Svislando), okaze de speciala kulturtago organizita de Bruno Graf. Sekvos ĝin prezentoj ankaŭ en Milano kaj Budapeŝto.

RETEJO PRI ORIGINALA LITERATURO ESPERANTA

La ampleksa retejo OLE, kompilita de Sten Johansson (<http://esperanto.net/literaturo/index.html>), komence de aŭtuno grave pliaktualiĝis.

LIBRO PRI ESPERANTA LITERATURHISTORIO PREPARATA

Kiel anoncis Kooperativo de Literatura Foiro, la verkado de "Historio de la Esperanta Literaturo" bone progresas. Kunverkas ĝin Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. La verko probable estos 500-paĝa kaj ĝi referencos kaj komplementos la ĝis nun ekzistantajn antologiojn de



Sten Johansson

originalaj novelaro kaj poezio. La poezian parton prizorgas prioritare prof. Minnaja, dum pri la teatro kaj prozo okupiĝas Giorgio Silfer.

RAGNARSSON ELEKTITA NOBEL-KANDIDATO

La islanda poeto kaj konata esperantisto Baldur Ragnarsson estas la nova kandidato de Esperantlingva Verkista Asocio por la Nobel-premio pri literaturo. La nomumo de la EVA-kandidato koincidas kun la apero de lia originala verkaro (poeziaĵoj kaj eseoj), kiu sub aŭspicio de EVA aperis titolita "La lingvo serena". Eldonis ĝin Edistudio en Pizo. Ĝi ampleksas ĉ. 800 paĝoj, kaj aĉeteblas je prezo de 27,00 eŭroj. La verko de Ragnarsson estis oficiale prezentita dum la 74-a itala nacia Esperanto-kongreso en Pizo (vidu raporton sur paĝo: 111).



Baldur Ragnarsson

HARFENDADO PRI LA JUBILEA SIMBOLO

Redakcia kompilo

Tuj post publikigo de la informo, ke UEA akceptis jubilean simbolon por la festota 100-jariĝo de la organizaĵo, la afero provokis diskutojn (eble eĉ disputojn!) en la reto, aparte en la paĝoj de "Libera folio". Ne estis kritikata nur la simbolo mem, sed ankaŭ la rajto festi centjariĝon de UEA.

Laŭ la lanĉita informo, 19 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 12 landoj partoprenis la konkurson pri la simbolo. Preskaŭ ĉiuj sendis pli ol unu proponon aŭ plurajn variantojn de sama propono. Anoncinde la konkurson la Estraro de UEA klarigis, ke la simbolo "emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj", kaj ke ĝi estu "elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike". En la prijuĝo partoprenis du UEA-estraj, el kiuj la malnova selektis kvin proponojn kiel "finalistojn", sed la nova Estraro elektita en Jokohamo, unuanime elektis la verkon de 24-jara kataluno Guillem Sevilla.

Al la aŭtoro oni ne povas riproĉi laikecon, ĉar li estas profesia grafika dezajnisto, verdire juna, sed tamen fakulo. Li finis 4-jaran studon pri "Arto kaj Dezajno" ĉe Aŭtonoma Universitato de Barcelono. Esperanton li eklernis antaŭ sep jaroj kaj nuntempe li estas membro de Kataluna Esperanto-Junularo. La jubilea simbolo ne estas lia unua kontribuo al Esperanto-kulturo.

La aŭtoro klarigis, ke la simbolo emfazas "per simpla kaj aktuala aspekto la tut-teran disvastigon de la neŭtrala lingvo Esperanto, atingitan grandparte danke al UEA". La simbolo "subtile rilatiĝas al tradiciaj esperantismaj identigiloj (stelo), sed ĝi uzas ankaŭ eksterajn identigilojn (parolvezikoj, kvin koloroj) rekoneblajn de la publiko, kiu ne konas la esperantistan heraldikon". La elektita emblemo ne havas unu fiksan formon, sed "temas pri fleksebla identiga sistemo kun senfinaj potencialaj variantoj depende de la bezonoj kaj rimedoj". La variecon li prezentis en maniero de bona grafikisto, kiu antaŭvidis eblan publikigon de la simbolo plurkolora aŭ unukolora, en presaĵoj aŭ en aliaj eldontechnikoj, kun aŭ sen teksto.

Kio do estis riproĉinda al lia verko? La plej grandan riproĉindaĵon lanĉis Jorge



La jubilea simbolo aŭtorita de Guillem Sevilla, kaj la logoo de Telemadrid: Ĉu plagiato?



Camacho (Hispanio), kiu atentigis pri granda simileco al logoo de la hispana televidkanalo "Telemadrid", kiu ankaŭ uzas stilizitan stelon formitan el plurkoloraj elementoj ĉirkaŭ ĝi. Li aperte nomis la simbolon plagiato, sed estis kontraŭstarita de aliaj diskutantoj, kiuj apenaŭ trovas similecon.

Dirk Bindmann komentis: "Ankaŭ mi rimarkas similecon, sed ne okulfrapan. Eĉ se mi scius, ke la aŭtoro de la jubilea emblemo konis la emblemon de Telemadrid, mi ne opinius lian verkon plagiato. La formoj ja sufiĉe diferencas. La telemadridaĵo enhavas tuj rimarkeblan kvinpintan stelon ene de kvinangulo. Ĉiuj formoj estas fermitaj. Kontraŭe la jubilea emblemo havas pli malfermitan formon. La parolvezikoj formas imageblan kvinangulon (sed alidirektan ol tiu de Telemadrid). Por vidi stelon necesus esperantista cerbolavo".

Loren Mitchel klarigas, ke "kvin diverskoloraj kvarlateroj enformas kvinpintan stelon" estas la sola simileco inter la du simbolojn, kaj neas plagiatacon eĉ nekonscian.



La juna kaj promesplena dezajnisto el Katalunio, Guillem Sevilla, aŭtoro de la jubilea simbolo.

LA 80-a SAT-KONGRESO EL MIA VIDPUNKTO

Etel Zavadlav

Inter la 21-a kaj 28-a de julio okazis la 80-a SAT-kongreso en la pariza antaŭurbo Antony. El niaj samlandanoj nur mi partoprenis ĝin, se tio entute gravas, ĉar Sennacieca Asocio Tutmonda intencas esti vere sennacieca, almenaŭ laŭ sia nomo. Konforme al tio, ĉi-jare ni havis nomŝildojn sur kiuj urbonomo anstataŭis tiun de la lando el kiu partoprenanto venis. La salutinda ŝanĝo tamen kaŭzis iom da amuza konfuzo. "Kie estas Split?", oni demandadis min leginte mian ŝildon. Feliĉe, neniu demandis kie estas Kroatio. Ĉiuj jam sciis.

La kongresa temo estis "Internacia solidareco". Oni intencas motivigi popolojn de pli feliĉaj landoj solidariĝi kun popoloj de tiel nomata Tria mondo. Tial estis pridiskutita la Monda Socia Forumo (vidu paĝon 97) okazinta ĉi-ijara en Najrobo, kaj nia kamarado el Tanzanio atentigis ĉiujn pri sia projekto "Mazingira", kies celoj estas helpi la loĝantaron de lia provinco. Li ankaŭ estas estro de tiu regiono, kaj li vere klopodas respondece agi por sia popolo.

Nu, komence el Parizo, mi kondukis la legantojn al Tanzanio. Mia opinio, nia lingvo ne estu nur amuzrimedo, sed prefere ni uzu ĝin pli konscie, por praktika kaj efika interhelpo kaj certa plialtiĝo de politika influo sur monda scenejo.

Mi invitas ĉiujn legantojn reagi al la tanzania apelo. Pri la projekto "Mazingira", kiu konsistas el 4 partoj, el kiu unu celas helpon al georfoj, informiĝu ĉe: <http://www.kono.be/mazingira/eo.html>. Kontraŭ tre modesta sumo por eŭropaj cirkostancoj, afrika infano povas esti edukita dum la tuta jaro.

Post la deflankiĝo, ni revenu al Parizo. La kongresejo situis ĉe iu kultura centro kun apuda trinkejo, kiu tre praktike influis nian kunlaboron. Laŭ kutimo, oni longe kunsidis, kaj interalie, akceptis decidon pri ŝanĝo de la unua artikolo de SAT-statuto. La termino "klasbatalo", kiu ne plu taŭgas en nuntempa epoko estis ŝanĝita kun granda majoritato.

Aliaj pritraktitaj temoj estis: estonto de semoj (ekologia), malarmado, kontraŭstaro al grapolbomboj, uzado de modernaj informadikaj programoj ktp.



La aŭtorino

Mi havis la okazon esti intervjuita ĉe Liberecana radio, informante la parizajn aŭskultantojn pri nia kongreso, sed plej celante informi ilin pri la projekto "Mazingira", kies peranto mi estas por Kroatio kaj Svisio. Se vi volas helpi la projekton, kontaktu min: etel.zavadlav@gmail.com.

La amuza programo estis vere bonkvalita kaj distra. Prezentigis muzikantoj, dancantoj, kantantoj, aktoroj... Senriproĉe.

Bedaŭrinde, la vivo ne estas nur por amuzo kaj sindistro! La nuna mondo devas urĝe esti ŝanĝita, se ĝi intencas travivi! Konstateblas, grandega fendo inter feliĉuloj kaj malsatuloj, ĉiutage rapide pligrandiĝanta! Bedŭrinde, la majoritato, la ĉefa parto de la homaro, kvankam ne malbonuloj, fariĝis indiferenta, fermante la okulojn antaŭ mizero de la resto de la homaro.

Pri la kongresaj riproĉindaĵoj, kiel ekzemple pri manĝoj en studenta manĝejo, prefere mi silentu.

Entute, mia raporto venas al la legantaro, esperante pri homecaj efikoj de Esperanto.

La diskuton pri la jubilea simbolo partoprenis ankaŭ Bjørn Bojesen (Danlando), kiu subtenas la aŭtoron, tamen akcentante, ke la parolvezikoj ne devas esti universale kompreneblaj, kun kio malkonsentas Slavik Ivanov dirante, ke parolveziko estas komprenebla ĉie kie oni pli-malpli vaste scipovas legi kaj kie ekzistas almenaŭ io el la tri: komiksoj,

reklamo, karikaturaj en gazetoj.


Ferriol Macip (Katalunio) gratulas al Guillem Sevilla pro la profesiega, alloga kaj trafa dezajno! Finfine li vidas ion grafike kvalitan en Esperantio, aldonante la profesiecan decidon de la Estraro de UEA, kiu akceptis la kreaĵon de kataluno apartenanta al asocio rifuzita de UEA tri-foje kiel landa sekcio. Guillem ne nur lecionis

pro sia profesieco sed ankaŭ pro sia kunlaboro. Opini pri verkaĵo estas tiel simple kiel diri "mi ŝatas" aŭ "mi ne ŝatas", estu la verkaĵo literatura, estu dezajna, estu kiel ajna. Ceteran kritikon fakuloj faru.

Post tio sekvis la diskuto kiu havis nenian lignon kun la jubilea simbolo, sed nur montris kiel funkcias la dinamika demokratio en Esperantujo.



VOLAPUKA VIKIPEDIO KREITA DE ESPERANTISTO



Ŝajnas, ke esperantistoj estas ege sentemaj rilate la temon de Volapuko. Mi ne estas certa pro kiu kaŭzo, sed al ili la preskaŭ morta Volapuko ŝajnas "danĝera lingvo", almenaŭ laŭ la diskuto, kiu aperis post kiam juna ruso publikigis informon, ke la volapuka Vikipedio estas pli granda ol la Esperanta. Al tio certe kontribuis ankaŭ la bombasta titolo "Volapuko jam superas Esperanton en Vikipedio" (en "Libera folio").

Vikipedio, la libera enciklopedio, redaktata de multaj personoj, evidente estas la plej populara Esperantlingva retejo en la mondo, kaj nombro de la artikoloj en Esperanto estis sufiĉe granda (ĉirkaŭ 89.000), por permesi al esperantistoj fanfaroni pri la pozicio de Esperanto en Vikipedio. Antaŭ nelonge tamen, subite, la volapuka Vikipedio kreskis de 797 al preskaŭ 112.000 artikoloj, kaj multe superis la Esperantan. Post informiĝo ĉe Yves Névelstein, unu el la aktivuloj de la Esperanta Vikipedio, montriĝis, ke tiu kresko estas kulpo de esperantisto Sérgio Meira, kiu, helpe de la teknologio, robote kreis centmilon da geografiaj artikoloj, parte bone verkitaj, sed - tradukitaj per komputila programo.

Post tiu ekscio, la reago de esperantistoj tute ne estis pacema, ĉar ili sentis konkurencon en kampo de internacia lingvo, kio volapuko certe ne povas esti per si mem, ĉar, laŭ fidindaj informoj parolas ĝin nur manplenu da homoj, kaj eĉ tiuj ne bone regas ĝin, des malpli interesiĝas pri ĝia prezento en modernaj medioj, kia estas Interreto.

Esplorante pri la "kulpulo", oni ekscias, ke li estas brazilano, naskiĝinta en Recife en 1968. Sed multe pli gravas, ke li estas profesia lingvisto, specialisto pri karibiaj kaj tupiaj lingvogrupoj de Suda Ameriko (respektive Amazonio). Oni ekscias, ke li scipovas, regas, aŭ paroletas dekkvinon da lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanton, kaj ke li laboras en la Universitato de Leiden (Nederlando).

Do, lia zorgo pri malgranda lingvo kia estas volapuko, lingvo kiu preskaŭ malaperis, estas tute komprenebla, se ni volas honeste diri.

Ĉu ne ni esperantistoj estas tiuj, kiuj parolas, ke nia celo ne estas endanĝerigo, neniigo kaj malaperigo de aliaj lingvoj, des pli la malgrandaj?

Kion do s-ano Meira faris? Li nur uzis la teknologiajn eblecojn, ĉar la homaj ne ebligis fari la saman!

Josip Pleadin

Aliflanke, stariĝas la demando, por kiu li faris la tutan aferon, se la parolantoj de Volapuko estas tiel raraj? Laŭ mi, ne gravas liaj celoj kaj intencoj, ne gravas eĉ en kiu pozicio pri la artikolnombro troviĝas la Volapuka aŭ la Esperanta Vikipedioj. Multe pli gravas, ĉu la kvalito de la materialo estas evidenta, kaj ĉu la materialo estas praktike uzebla kaj uzata. Se Vikipedio celas respekti la uzeblecon de la tie prezentita materialo, kompreneble, ke ĝi devus celi

disponigi la materialon en lingvoj de multaj uzantoj. Ĝi estos granda enciklopedio nur tiam, kiam ĉiu artikolo estos legebla en ĉiu lingvo. Tion, kompreneble, malgraŭ la homaj streĉoj, oni ne povas fari sen subteno de teknologio, kion jam nun faris s-ro Meira. Ĉu ni esperantistoj ne fanfaronas, ke nin ne regas antaŭjuĝoj? Kial do ĉi-foje ni faru escepton? Kompreneble, multaj vikipediistoj kontraŭas uzadon de robotoj, multaj riproĉas troecon de t.n. "ĝermoj", nefinitaj kaj nesufiĉe kvalitaj artikoloj, malbonan lingvajon, nekompetentajn kunlaborantojn ktp. Sed, karaj, tio estas rezulto de troa libereco! Se vi permesas LIBERE redakti tion, tiam vi ne povas diskuti pri la kvalito, ĉar ĉiu sencenzure (aŭ almenaŭ kun cenzuro de alia persono) povas aldoni sian kontribuojon.

Resume: mi neniel povas akcepti la tro grandan atakon al s-ro Meira el vicoj de esperantistoj, des malpli la mokajn kaj ofendajn, kiajn iuj nelingvistoj kaj nefakuloj eldiris en

"Libera folio". S-ro Meira provis klarigi sian vidpunkton en tute alia tono, per argumentoj. Jen kion li skribis:

"(a) Mi kredas, ke ni ĉiuj konstenas, ke oni ne devas juĝi Vikipedion nur laŭ nombro de artikoloj. Tiuj, kiuj pensas tiel, simple eraras; oni devus klarigi tion kaj prezenti ĉiujn argumentojn por forigi tiajn ideojn. Kiel mi diris (vd. mian Volapukan diskutopaĝon), oni povas eĉ diri, ke Vükiped estas bona argumento kontraŭ tiu ideo. Mi eĉ proponas, ke mi mem skribu pri tio (ie



Johann Martin Schleyer (1831-1912), germana rom-katolika pastro, aŭtoro de Volapuko en 1879.

MONDA SOCIA FORUMO (MSF) EN NAJROBO – KARNAVALA ETOSO

✍ Etel Zavadlav

Ĉi-jare, inter la 19-a kaj 25-a de januaro, okazis Monda Socia Forumo en Najrobo, kenja ĉefurbo.

Kiel delegito de Esperanta Civito, mi havis bonŝancon partopreni tiun homamason. Tiukaze kolektiĝis pli ol 100.000 (cent mil) homoj ĉe stadiono nomata Kasarani.

Ni havis budon sur malbona pozicio, kvankam ĝi estis pagita anticipe kaj multekoste. Pro la pozicio tute netaŭga, ni devis ŝanĝi la lokon, por esti almenaŭ rimarkitaj. Feliĉe, franca Ligo por lingva libereco volonte kaj ĝoje gastigis nin. Ni bone kunlaboris dum la tuta semajno kaj sukcesis kolekti vere multajn subskribojn de interesigantoj pri nia lingvo.

La libro kun ties nomoj estis sendita al UEA kaj ĝis nun tiuj personoj espereble estas lernantaj Esperanton.

Impresoj pri la lando kaj urbo multas. Eŭropanoj kiuj neniam vojaĝis al Afriko, certe estas surprizitaj per tiea etoso. Kvazaŭ mi sonĝus, aŭ spektus iun filmon...

Sed, pli gravaj ol turismumado, estas efikoj de la menciita evento, Monda Socia Forumo.

Fakte, miaopinie, tiuj efikoj, eĉ se ekzistas, estas nur minoraj kaj etaj: minoritatoj interkonatigas kaj eventuala kunlaboras. Sed "malamiko", imperio, restas netuŝita per tiuj klopodoj. Eble oni permesas tiun karnavalon (vere, ĝi tre similas la karnevalon en Rio; multaj kostumitaj grupoj dancas ĉirkaŭe, postulante siajn rajtojn, kaj esperante ke iu aŭskultos kaj plenumos ilin ... ho, kiel naïve!) nur por havi

nomliston de eventualaj danĝerelementoj, kiuj eble iam povus skui tronon de la imperio.

Jam pasis 9 monatoj post tiam, kaj mi vere ne vidas iajn ŝanĝojn sur la monda scenejo. Neniu kuraĝas postuli de Internacia Mon-Fonduso tujan kaj senprokranan nuligon de la eksteraj ŝuldoj por landoj de tiel nomata "tria mondo". Kaj neniu firme insistas, ke gravuloj vere faru tiel. Kiun koncernas suferoj de povruloj kaj mizeraj amasoj en la mondo? (En Mombaso mi vidis propraokule junulojn trafitaj per lepro kaj kriplulojn kun lignaj lambastonoj nur tranĉitaj de iu arbo ... Horore!)

Mi povis esti trankvila dum tiu trisemajna ekskurso, ĉar mi ĝuis belajn hotelservojn kaj, plej grave, mi havis flugbileton en mia poŝo. Refluginte al Zuriko mi sentis grandan malpeziĝon, mi konfesas sincere. "Ha, finfine, normala temperaturo kaj normala lando!", mi pensis.

Tamen, facile estas kompreni kaj supoziti la sentojn de loka popolo. Kiel karceri senelira aspekto tiu urbo granda, malodora, plenplena da kaosa trafiko, malriĉa, kun infanoj mangantaj rekte el rubujo. Kie estas eliro por tiuj homoj?

Nenie mi rimarkis maljunulojn. Simple, ĉar ili ne ekzistas. Supozita vivdaŭro estas ĉirkaŭ 45-50 jaroj. (En Svislando multaj simpatiaj avinjoj tiras kvarradetajn helpilojn por marŝi!).

Anstataŭ daŭre priabadi ilin, ĉu fortaj landoj iam malfermos pordegon de tiu prizono, por akcepti loĝantaron de la tria mondo?

en interreto, aŭ en la Esperantlingva Vikipedio). Kvalito kaj kvanto estas evidente du apartaj aferoj!; (b) Ne koleru, se iu nelogike pensis, ke Vikiped estas pli bonkvalita ol la Esperantlingva Vikipedio - pli bone estas klarigi, kial tiu ideo ne pravas, kaj doni al ili aliajn kriteriojn por juĝi Vikipediojn. (Kiajn? Jen interesa diskuto! Mi plezure partoprenus... En mia Volapuka diskutopaĝo jam estas

("Esperanto havas nur deksesregulan gramatikon")? Ne, ni devas nur klarigi, diskuti, kompari argumentojn.; (c) Ĉu robote pligrandigi estas bona ideo? Sendube. Ĉiuj grandaj Vikipedioj havas multe da robotaj ĝermoj. (Ankaŭ homaj ĝermoj - ĉu vere multe diferas ĝermo farita de homo, de ĝermo farita de roboto, se ambaŭ ĝermoj korekte kaj senerare priskribas siajn faktojn?) Sed kio okazas, kiam iu Vikipedio havas (preskaŭ) nur robotajn ĝermojn? La kvalito malkreskas. Ĉu tio estas tre malbona? Dependas de tio, kion vi celas. Ŝajnis al mi, ke: tiu povus allogi kunlaborantojn kaj tiel plibonigi la kvaliton de la Volapuka Vikiped (kio eble alimaniere neniam okazus); tiu tute ne damaĝas la laboron de aliaj Vikipedioj, kiuj tute ne dependas de la Volapuka situacio; tiu donus praktikan, realan ekzemplon de tio, kion ne volas fari pli bonaj Vikipedioj, kaj ebligus diskuton pri kriterioj, celoj, kvalito ktp."

Kun s-ro Meira ni ne devas konsenti, sed, homoj, Vikipedio estas "LIBERA ENCIKLOPEDIA", do LIBERE uzu ĝin. Se vi ne volas, ankaŭ tio estas via persona elekto!



**Sergio Meira -
"la kulpulo"**

unu propono. Ĉu Volapukistoj devus koleri, se oni ankoraŭ volus uzi senpripense malnovajn argumentojn



Kroatio, Josip loĝas en Durdevac, en la nordorienta parto. En Hungario la respondintoj loĝas en Kaposvár, Pápa, Veszprém kaj Győr. Béla el Kaposvár skribis, ke lia bofilo estis malsana kaj mi decidis fari nur du etapojn en Hungario (unu en Veszprém apud la lago Balatono kaj unu en Győr apud Slovakio).

Mi planis nian vojaĝon rilate al niaj venontaj etapoj kaj rilate al nombro de tranoktoj kiujn proponis la gastigantoj.

Maldekste: Silvain kaj Sophie dum la vizito al vitropentrista muzeo. **Sube:** Legomaĵo el Dromo nomita "Ratatouille" kuirita por la gastigantoj.



NIAJ UNUAJ FERIOJ PER PASPORTA SERVO

Mi nomiĝas Sophie Le Sourne kaj mi estas 33-jara francino. Mi estis surprizita sed tre kontenta, kiam la redakcio de "Zagreba Esperantisto" proponis al mi fari artikolon pri niaj ferioj per Pasporta Servo. Kia defio por mi!

Pasportan Servon mi konis dank' al mia Esperanto-instruistino Françoise Rochette. En novembro pasintjare, alia lernanto volis vojaĝi al Maroko. Françoise montris libreton de Pasporta Servo kaj klarigis pri ĝi. Scivolema, mi aŭdis la konversacion kaj petis pruntepreni la libron. Hejme mi komprenis ĝian altan valoron por mi kiu deziras renkonti kaj koni aliajn homojn. Mi sciis, ekde tiu momento, ke ni vojaĝos per Pasporta Servo. Kiam? Mi ne sciis ankoraŭ.

Tiutempe mi serĉis laboron kaj mi ne sciis ĉu mi trovos laborkontrakton kun mallonga aŭ longa daŭro. En februaro 2007 mi estis dungita en aeronautika firmao per du kontraktoj, ambaŭ por tri monatoj. Je la fino de junio mi eksciis, ke tiu firmao volas dungi min por longa tempo kaj mi sciigis, ke estos devigaj ferioj dum la tri unuaj semajnoj de aŭgusto. Mi devis decidi rapide kien foriri dum la ferioj. Françoise, mia instruistino, diris al mi, ke Slovenio estas tre bela lando. En julio la longdaŭra laborkontrakto kun mia firmao estis subskribita, kaj mi decidis ferii en Orienta Eŭropo.

Serĉado de esperantisto

Elektinte el Pasporta Servo, mi sendis retmesaĝojn al samideanoj en Slovenio, Kroatio kaj Hungario. Mi volis malkovri tiujn tri landojn, sed mi ne volis fari multe da kilometroj pro nia nur 27-monatajn aĝa filino. El la senditaj 10-15 retmesaĝoj, mi ricevis 5-6 favorajn respondojn: unu el Slovenio, unu el Kroatio kaj 4 el Hungario.

En Slovenio, Jovan loĝas en la ekstremorienta parto de la lando, en Lendava. En

Dum tuta julio mi korespondis kun Josip, Jovan, Lászlo kaj István. Mi informigis ĉu ili havas infanojn, kie ili loĝas, mi demandis pri la irvojo por trovi ilin, ĉu ili havas apartan gastaĉambron, kaj mi donis pli da detaloj pri nia vivo.

Je la fino de julio, ni sciis kie ni loĝos dum ekzaktaj datoj: dum la unua etapo en Slovenio en hotelo por tri noktoj, poste ni iros al Kroatio por tri noktoj kaj al Slovenio por tri noktoj ankoraŭ. Nia lasta etapo estos en Hungario por tri noktoj ĉe du hungaraj gastigantoj.

Pro malfacilaĵo por ricevi pasporton por nia filino, ni decidis foriri la 1-an de aŭgusto. Trairinte Italion, ni alvenis apud Ŝkofja Loka en Slovenio, kie ni restis en bela pensiono dum tri noktoj. Ni vizitis la regionon apud Bled kaj Ljubljana.

Unua etapo en Kroatio

Poste ni havis rendevuon en Durdevac la 4-an de aŭgusto kun Josip. Ni veturis ekde Crngrob apud Ŝkofja Loka ĝis Durdevac, uzante la irvojon kiun Josip donis al mi rete. Kiam ni alvenis en lian domon, Josip venis al ni kun Anita, sia filino. Josip kaj Nada, lia edzino, havas tri infanojn: Branko, Maja kaj Anita. La komenco estis malfacila pro mia nivelo de Esperanto. Mi komprenis bone kiam Josip parolis malrapide sed mi havis problemojn por paroli Esperanton. Tamen Josip estis tre pacienca kun mi. Ni donacis al ili kelkajn produktojn de Dromo, nia regiono en Francio. Ni klarigis per mapo kie ni loĝas kaj Josip klarigis al mi la politikan situation de eks-Jugoslavio. Josip kun sia familio estas tre akceptema kaj varma: ni manĝis dum ĉiuj tri tagoj kune. Li montris al ni sian urbon kun la kastelo. La duan tagon, li montris al ni alian pli grandan urbon, Koprivnica kaj muzeon de



famaj kroataj vitropentristoj, Ivan kaj Josip Generalić. Nóirín, nia filino, havis du amikinojn: Anita kaj Ivana, ŝia najbarino. Ili zorgis pri Nóirín dum tri tagoj sen lingvoproblemo. Nóirín lernis "Bok", saluton en la kroata lingvo. Ni foriris kun multe da ĉagreno, sed kun la promeso reveni ankoraŭ alian fojon.

Dua etapo en Slovenio

Post Durdevac, ni havis rendevuon en Lendava, 100 kilometrojn norde, ĉe Jovan por kelkaj tagoj. Ni alvenis la 7-an de aŭgusto kaj Jovan pensis, ke ni alvenos unu tagon pli malfrue. Tamen li akceptis nin kun multe da respekto. Samkiel en la domo de Josip, ni havis apartan ĉambron por ni tri. Vespere, ni kunmanĝis bongustan kokon kun terpomoj. Donacinte produktojn el Dromo, ni interparolis pri nia regiono kaj nia vojaĝo. Por la tagoj sekvantaj, li proponis al ni promenadon piede ĉirkaŭ lia domo (lime de Hungario, Slovenio, Kroatio) kaj la viziton de pluraj lokoj. Fakte, la morgaŭan tagon ni promenis en la montaroj apud la domo de Jovan. Li klarigis al ni, ke lia regiono estas fama pro vino. Ni gustumis iom da vino en vinkelo super la altaĵoj de Lendava. La duan tagon, li montris al ni specialajn lokojn: muelejon ĉiam funkciantan, kie ni aĉetis fagopiran farunon, kaj parkon kien la homoj venas forigi dolorojn aŭ suferojn. Post tiu promonado, ni iris al pli granda urbo apud Lendava, Murska Sobota, kaj ni manĝis en gastejo fama pro siaj kalmaraj pladoj.

Tria etapo en Hungario

Post tri tagoj kun Jovan, ni veturis al Veszprém en Hungario apud la lago Balatono. Ni vizitis la urbon Keszthely kaj vespere ni alvenis en Veszprém. Láslo kaj lia edzino ne estis hejme ĉar ili havis laborojn kun diversaj horaroj. Germana virino kun siaj tri filinoj akceptis nin, klariginte al ni la situacion. Ili alvenis ankau per Pasporta Servo por kelkaj tagoj. Ŝi diris al ni, ke Láslo devis reveni je la 5h00 matene kaj lia edzino je la 11h00 vespere. Ni loĝiĝis en la ĉambro ĉar la alia familio tendumis en la ĝardeno. Tamen Láslo kaj lia edzino devis trairi nian ĉambron por iri al sia ĉambro. Post vespermanĝo, ni iris en nian liton ĉar ni estis laĉaj sed la hundo daŭre bojis ekstere dum la tuta nokto ĝis la alveno de Láslo je la 5h00 matene. Ni estis ankoraŭ pli laĉaj ol tagon antaŭe kaj ni decidis foriri matene al alia loko.

En Győr, István atendis nin la 13-an de aŭgusto kaj lia familio ne estis hejme por la semajnfino. Pro la pluvo en lago Balatono, ni decidis veturi al nordokcidento de Hungario. Ni tranoktis du tagojn en hotelo en Kőszeg apud la aŭstria landlimo. Do ni vizitis tiun regionon inter Hungario kaj Aŭstrio.

La 13-an de aŭgusto, ni foriris al Győr, lasta etapo de nia periplo. Ni alvenis vespere kaj ni renkontis Betty, la edzinon de István. Betty kaj István havas 2 infanojn: Sarah kaj Láslo. István alvenis hejme ĉirkaŭ la 8h00 vespere, ni manĝis ĉiuj kune kaj ni interparolis pri la regiono de Dromo.

Mi havis problemon por kompreni la tutan familion. Fakte, la infanoj estas denaskaj esperantistoj. Ili parolas la hungaran lingvon kun la patrino kaj

Esperante kun la patro. Estas tre malfacile kompreni ilin kaj diskuti ĉar ili parolas tre rapide.

La morgaŭan tagon ni vizitis Győr, la urbon apud la urbeto de Betty kaj István. Ni vizitis ankaŭ la ĝardenon de la abatejo de Pannonhalma. Ni telefonis al Jovan por scii ĉu ni povos tranokti unu nokton. Ni diris al István, ke ni foriros unu tago pli frue ol antaŭe planite.

La 15-an de aŭgusto ni foriris frue de Győr kaj alvenis al Lendava por viziti la tiean termalbanejon kun Jovan dum la posttagmezo. Ni manĝis kune vespere kaj ni foriris al Francio la 16-an de aŭgusto kun decido certe reveni iam.

La avantaĝo de Esperanto kaj de Pasporta Servo estas renkonti kaj vivi en la domoj de aliaj malsamlandanoj. Ni vizitis 4 diversajn hejmojn kun iliaj propraj kutimoj. Ni devis alkutimiĝi al iliaj vivmanieroj. Ni vizitis tri diversajn landojn kun tri diversaj lingvoj. Mi memoras, ke kiam ni estis solaj, ni havis problemojn por komuniki. Dankon al ĉiuj geesperantistoj kiuj akceptis nin: ili estis ponto inter ni kaj alia vivmaniero.

Nun Sylvain, mia kunulo, lernas Esperanton por venonta vojaĝo, ĉar li deziras komuniki pli facile kun niaj venontaj gastigantoj kaj gastoj.

Fakte, nia unua sperto estis tiom sukcesa, ke ni aliĝos al Pasporta Servo por, niavice, akcepti gastojn kaj dividi iom da nia vivo kun aliaj homoj. Krome, ni foriros denove dum ĉi-jara Kristnaska periodo al Svedio - ankaŭ per Pasporta Servo.

En la unua aperjaro, nia redakcio disponigis certan kvanton da senpagaj abonoj al nepagipovaj esperantistoj. Ekde 2008 estas malfermita aparta

ABONHELPA FONDUSO

al kiu ĉiu esperantisto, leganto aŭ abonanto, povas donaci certan sumon. El la kolektita sumo estos pagataj abonoj por nepagipovaj esperantistoj, ĉefe en landoj de Afriko kaj Azio. La pagojn bonvolu direkti al nia konto ĉe UEA: **plea-k** (kun mencio: "Abonhelpa fonduso"), aŭ enlande rekte al nia redakcio per poŝtmandato aŭ pagante al ĝirkonto de la eldonanto (vidu la paĝon 90).

Ĝis nun ricevitaj pagoj:

1. Raita Pyhälä (Finnlando) 5,00 eŭroj

 *Snježana Habulin*



LA UNUAJ FABRIKOJ

Ankoraŭ en la malproksima jaro 1862 Franjo Pokorny komencis en Zagrebo produktadon de alkoholaj trinkaĵoj kaj vino, konstatinte tiam, ke en la kroataj vinkeloj kuŝas grandega nacia trezoro, sed li atentigis "ke ni devas forigi malbonan praktikon". Nelonge post tio la produktoj de Zagreba reĝa fabriko de vino kaj alkoholaj trinkaĵoj, fariĝis aprezata varmarko en la tuta Eŭropo, kaj el tiu fabriko ekestis la hodiaŭa fabriko "Badel 1862", kiu estas le plej granda vin- kaj alkoholtrinkaja produktanto en Kroatio, eksportante al 26 landoj. Unu el la plej malnovaj kroataj firmaoj estas la zagreba dolĉaĵfabriko "Kraš", fondita en 1911 per unuigo de zagrebaj dolĉaĵmajstroj, kaj ĝia nuntempa nomo estas parto de la zagreba tradicio. "Kraš" ankaŭ nuntempe estas la plej granda produktanto de konditoraj produktoj en la sudorienta Eŭropo.

KONSTRUAĴO DE KROATA NACIA TEATRO EL 1895

Konstruaj planoj pri masonado de Kroata Nacia Teatro en Malsupra urbo estis menditaj de konataj vienaj arkitektoj Ferdinand Fellner kaj Herman Helmer, aŭtoroj de kvardeko da eŭropaj teatrejoj. Post nur iom pli ol dek ses monatoj da laboro, la teatrejo estis finkonstruita laŭplane, kaj solene malfermita la 14-an de oktobro 1895, kun ĉeesto de la imperiestro Francisko Jozefo la Unua, kiu per arĝenta martelo, produktita de la skulptisto Robert Frangeš Miĥanoviĉ, faris la simblan finbaton sur la balkona barilo super la ĉefa enirejo. Novbaroka konstruaĵo de Kroata Nacia Teatro en Zagrebo estas ĉirkaŭita per multaj konstruaĵoj havantaj altan monumentan valoron, kiu reprezentas la kroatan arkitekturon fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj. En ĝi kontinue funkcias tri artbranĉoj: dramo, opero kaj baletoj, kaj ekde la komenco la repertuaro estis riĉa kaj diversa, konsistanta el mondaj klasikaj, nacia tradicio kaj moderna artkreado. Dum ĝia 150-jara historio, tra la teatro tramarŝis plejado de la plej grandaj artistoj, verkistoj, aktoroj, reĝisoroj, scenografoj kaj kostumistoj, mondaj operaj kaj baletaj artistoj, direktistoj kaj koreografoj.

SEPTEMBROFINE ĈE ZLATA NANIĆ

La lastan septembran tagon elektis **Zlata Nanić** (naskita en 1941) por inviti al sia bieno "Zrno" (=Grajno) en Habijanovac (55 km for de Zagrebo) siajn geamikojn por tuttaga pikniko. Kolektiĝis kelkcent personoj, el kiuj plejparto estis produktantoj aŭ konsumantoj de ekologiaj manĝaĵoj. Ne mirigas tiu fakto, ĉar Zlata estas unu el la kolonoj de ekologia agrikultura produktado en Kroatio. Kvankam diplomata ekonomikisto, en 1988 ŝi aĉetis 6-hektaran bienon en Habijanovac kaj komencis okupiĝi pri organika produktado de cerealoj, legumenacoj, diversaj legomoj, berfruktoj, spicaj kaj sanigaj plantoj. Ŝia bieno fariĝis iaspeca botanika ĝardeno, kaj nuntempe ĝi estas loko kie okazas ekologiaj, agrikulturaj kaj naturprotektaj seminarioj kaj prelegoj. En 1995 en ŝia bieno estis fondita ankaŭ Asocio "Ziva Zemlja" kun 16 membroj-fondintoj, kaj ŝi mem fariĝis prezidanto de la Asocio, kiu nuntempe havas pli ol 500 membrojn. Zlata apartenas al la plej aktivaj laborantoj por publika prezento kaj edukado pri biologia ĝardenado, ekologia agrikultura produktado kaj naturaj nutraĵoj, pri kio ŝi skribis kelkajn librojn, interalie akau en Esperanto aperis ŝia "Manĝoj el sanigaj plantoj".

Pri Esperanto ŝi ekinteresiĝis ankoraŭ en elementa lernejo, kaj eklernis ĝin en Bjelovara gimnazio en 1956. En Bjelovar ŝi estis membro de loka societo, partoprenis en 1958 kultural festivalon de jugoslavaj esperantistoj en Rijeka kaj Opatija. Ŝia okupiĝo pri Esperanto ĉesis dum la studentaj jaroj (ekde 1962) kaj rekomenciĝis en 2000, senpere antaŭ la Universala Kongreso en Zagrebo, ekde kiam ŝi estas konstanta vizitanto de Universalaj Kongresoj kaj aliaj aranĝoj. Ŝiajn ekologiajn produktojn gustumis ankaŭ la kongresanoj en Zagrebo en 2001. Ŝia granda deziro estas, tre baldaŭ ricevi atestilon de ILEI-ekzameno kaj komenci instrui Esperanton al junaj generacioj.

En la pikniko per kiu komenciĝis nia rakonto pri Zlata, ŝi reklamis Esperanton per tute specifa maniero. Inter multaj standoj de nutraĵproduktantoj, apartan standon havis ankaŭ esperantistoj, kaj la scenejon en iu momento okupis grupo de tie kolektiĝintaj esperantistoj kaj Zlata kun aliaj esperantistinoj gaje kantis kanton en Esperanto. Certe kopiinda maniero reklami siajn ideojn sentrude! La apudaj fotoj montru la etoson al tiuj, kiuj forestis.



  **Josip Pleadin**



KURISTO EN RIO DISVASTIGAS ESPERANTON

Dum la 20-a Mararmea Stratkurado en Brazilo, la 5-an de aŭgusto atleto Walter Fontes partoprenis portante la Esperantan flagon. Lia reklammaniero de Esperanto estis postsekvo de la debato kadre de ronda tablo "Esperanto en Sportoj" okazinta dum la 42-a Brazila Kongreso de Esperanto.

PROJEKTO GUTENBERG

Projekto Gutenberg celas riĉigi la mondon per senkosta kaj libera publikigo de ĉiaspecaj verkoj. La projekto de usonano Michael S. Hart starigita en 1971, nun ofertas, per KD, DVD, kaj per retpaĝaro (<http://www.gutenberg.org>), pli ol 20.000 senkostajn, reuzeblajn kaj eĉ preseblajn librojn. Du milonoj da libroj estas elŝutataj ĉiumonate. La retpaĝaro kaj la prezentita literaturo grandparte estas anglalingvaj, sed bonvenigas ankaŭ aliajn lingvojn. En la Projekto Gutenberg kunlaboras ankaŭ Esperanto-teamo, kiu bezonas helpantojn kaj donacojn en formo de kopirajto de libroj verkita en Esperanto, por aldoni ilin al la jam disponeblaj 29 libroj. En la Esperanta teamo laboras 25 personoj, kiuj okupiĝas precipe pri Esperantaj tekstoj. Bezonataj estas ankaŭ kontrolantoj de la verkoj. Generale la Projekto Gutenberg, kompare kun 29 Esperantaj libroj, disponas pri 19.340 anglaj, 1.069 francaj, 70 ĉinaj, 118 portugaliaj, 7 islandaj ktp. El Esperantaj aŭtoroj la kopirajton transdonis al Projekto Gutenberg ekzemple Edwin Grobe (Usono), Odd Tangerudd (Norvegio), Miroslav Malovec (Ĉeĥio), Donald Broadribb (Aŭstralio). Por atingi limon de plej popularaj lingvoj, Esperanto devus atingi minimuman kvanton de 50 libroj, kio grave helpos montri ke Esperanto estas vivanta lingvo kun konsiderinda literaturo. Vidu diskutgrupon: <http://groups.yahoo.com/group/PorGutenberg/>. Informoj ĉe:

Robert L. Read (read@robertread.net).

UNUA KONGRESO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ
Gastigita de Jagodina Esperanto-Societo, la 11-an de aŭgusto en Jagodino okazis kunsido de Prezidantaro de Serbia Esperanto-Ligo, kiu ĉefteme diskutis pri organizado de la 1-a kongreso de serbiaj esperantistoj. La kongreso okazos inter la 1-a kaj 4-a de majo 2008 en Niš (Niška Banja), kaj la ĉefa organizanto estos Esperanto-societo "Ĉele kula". La kongresa protektanto estos la urbestro de Niš, kaj oni atendas partoprenon de ĉirkaŭ 200 kongresanoj kaj gastoj.

SAT-KONGRESO

La 80-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis de la 21-a ĝis la 28-a de julio en Antony, 12 km sude de Parizo, kun partopreno de ĉirkaŭ 140 kongresanoj. La kongresa temo "Internacia Solidareco" estis pritraktita en debatoj kaj prelegoj de pluraj prelegantoj: Mramba Simba, Jakvo Schram, Daniel Durand, Robin Beto, Petro Cardona, Colette Weiss, Etel Zavadlav kaj Gerardo Lieblang. En la kultura kongresparto okazis koncertoj de Kosmopolitoj, FAMO, Olivier Herbay kaj JoMo kaj Liberecenoj, kaj dramaj prezentoj de Jocelyne Monneret kaj Franciska Toubale. Ĝeneralaj laborkunsidoj traktis i.a. pliampleksigon de la redakcio de "Sennaciulo", starigon de plurpersona financa kontrolkomisiono, revigligon de SAT-rondoj en diversaj mondopartoj, starigon de skipo por esplori eblan KD-version de PIV, kaj daŭrigon de la eldonlaboro. Aparte kuraĝigaj post financaj problemoj sentitaj de kelkaj jaroj, estis la unuaj laborfruktoj de la Eldona Fako Kooperativa de SAT. Antaŭ la kongreso eldoniĝis libroj "Mortopuno: faktoj & dokumentoj" kaj "Ĉu ili diras al ni la veron?". La membronombro malkreskas,

kaj laŭ la lasta kalkulo SAT havas 724 membrojn. Laŭ prognozoj, la enspezoj el kotizoj kaj donacoj sufiĉos por kovri la neprajn elspezojn, kie oni kalkulas ankaŭ laborigon de la oficisto Krešimir Barković ĝis lia emeritiĝo post 20 monatoj. Oni prezentis ankaŭ novan varbmaterialon de SAT-Amikaro. Postkongrese okazis kvintaga staĝo ĉe Kvinpetalo en Bouresse pri Lanti kaj sennaciismo. Venontjare SAT-kongreso okazos en la fama Roza Valo en Kazanlak (Bulgario).



USONAJ ARANĜOJ

Nekutime landaj asocioj organizas siajn kongresojn en alia lando. Ĝuste tion spertis la usonaj esperantistoj, kiuj okazigis sian **landan kongreson** de la 17-a ĝis la 30-a de julio en hotelo "Pueblo Amigo" en Tijuana (Meksiko). Pri la kongresa temo "Internacia Kunlaboro" kontribuis profesoro Duncan Charters per prelego "Amikeco trans landlimoj". Por la unua fojo estis proklamitaj ricevintoj de *Premioj Harlow* por tradukoj de usona literaturo, gajnintaj de Per Aarne Fritzon, Christopher Zervic, George Baker, Rull Williams, kaj Kris Long. La usona landa asocio rajtas eldoni la premitajn verkojn en sia

bulteno *Esperanto USA* kaj en la libro *Usona Antologio*, kies preparojn gvidas Tim Westover, estro de la eldona komitato. Prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, Ron Glossop, dumkongrese instruis komencantojn. Lusi Harmon unuanime fariĝis honora membro de *Esperanto-USA* pro la grandaj kontribuoj al la movado, aparte pro la filmserio *Esperanto - Pasporto al la Tuta Mondo*. La ĉefa kongresa decido rilatis la ŝanĝon de la nomo de landa organizaĵo, kiu ne plu nomiĝos Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA), sed *Esperanto-USA*. Kiel estraranoj de Esperanto-USA estis elektitaj Jenja Amis, Anjo Harlow, Christopher Zervic, kaj Tim Westover. Julie Spickler elektitiĝis sekretario, dum Filipino Dorcas estas prezidanto. D-ro Steve Brewer, la reprezentanto de Esperanto-USA en Amerika Komisiono de UEA, estris apartan kunsidon. Antaŭ la kongreso la estraro de Esperanto-USA aferkunsidis en Santee, Kalifornio, kaj aliaj ekskursis en suda Kalifornio al la Universitato de Kalifornio ĉe San Diego, kie okazis la **Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK)**. Gviditaj de la ĉi-jaraj instruistoj Lee Miller kaj Paul Gubbins, la prelegoj de NASK dum tri semajnoj parte rilatis la verkaron de William Auld. Partoprenis 24 diversaĝaj lernantoj el Usono, Kanado, Germanio, Japanio, Makedonio kaj Irano. En posttagmezaj programoj oni informiĝis pri kanadaj pentristoj, lernis pri veganismo kaj moderna arkitekturo, verkis poemojn, promenis, dancis, ktp.! Aperis eĉ ĉiutaga bulteno *La NASKa Fasko* kun artikoloj verkitaj de la lernantoj. Pri tiu ĉi vaora aranĝo pli da informoj vidu ĉe: <http://esperanto.org/nask>. Por partopreni eblas ricevi stipendiojn.

KOMISARO MAIGRET LA KVARAN FOJON EN ESPERANTO

Fine de aŭgusto *Sezonoj*



(Ruslando) aperigis la libron **La flava hundo** de Georges Simenon en la traduko de Daniel Luez, kiu unuafoje en Esperanto prezentis la librojn de Simenon en 1999, Esperantiginte la romanon *Maigret hezitas*. Ĉar temis pri la aŭtoro, kies verkoj eldoniĝis en 500 milionoj da ekzempleroj kaj en kvardeko da lingvoj, kaj ĉar la unua libro rapide elĉerpiĝis, *Sezonoj* estis instigitaj eldoni pliajn librojn. La Esperantaj tradukoj de *Maigret kaj la maljuna damo* aperis en 2002, kaj de *Amiko el la junaĝo de Maigret* en 2004. **La flava hundo** estas unu el la plej fruaj romanoj pri Maigret, eldonita en 1931. La Esperanta versio de la libro estas presita en Kaŭno (Litovio), kun la kovrilo dezajnita de Larisa Jakovleva. Ĝi estas baldaŭ mendebla en la Esperanta merkato tra diversaj libroservoj kontraŭ 12,00 eŭroj.

BANADA SEMAJNFINO POR ESPERANTISTOJ

okazos inter la 16-a kaj 18-a de novembro 2007 en Lendava (Slovenio). Kunorganizas ĝin



TERME LENDAVAL

Fervojista Esperanto-Societo Maribor kaj Kultura Societo Lendava (Slovenio). Lendava situas 28 km oriente de Murska Sobota kaj 80 km de Maribor, apud la slovena-hungara landlimo. Prezoj: inter 83 kaj 95 eŭroj en dulita ĉambro de tristela hotelo. La prezo inkluzivas: turisman imposton, duonpensionon (vespermanĝo + matenmanĝo), banadon sen tempa limigo (kun la ebleco de tuttaga banado je la forira tago, nokta banado vendrede kaj sabate), uzo de trejnsalono (fitness) kaj saŭno unufoje tage. Krompago por unulita ĉambro = 9,00 eŭroj po nokto; por plena pensio = 8,00 eŭroj po persono. Sabaton, la 17-an de novembro, antaŭvidita pikniko ĉe iu vinkelo en la ĉirkaŭaĵo de Lendava (kun aparta pago). La aranĝo estas senkotiza. Pri detaloj informiĝu ĉe Jovan Mirkoviĉ: j.mirkovic@siol.net.



ITALA RADIO ĈESIS ELSENDI EN ESPERANTO

La 1-an de oktobro la itala radio RAI ĉesigos siajn mallong-ondajn elsendojn al eksterlando. Programoj en kelkaj lingvoj estos plu produktataj por elsendo per satelito kaj interreto. Interalie, malaperos ankaŭ la Esperantlingvaj elsendoj, kiuj komenciĝis en 1935, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Romo, kaj post la dua mondmilito rekomenciĝis en 1950. Ekde la jaro 1971 kiel tradukisto kaj parolisto en la Esperantlingva programo laboris Antonio De Salvo. La dudekminutaj elsendoj lastatempe estis disaŭdigataj ĉiun sabatan vesperon. La Esperantlingvaj elsendoj estis disvastigataj ne nur per mallongaj ondoj, sed ankaŭ per la eŭropa satelito Hotbird, uzante malnovan, analogan satelitan teknologion.

Hiroŝimo

"Hiroŝimo" estas japana urbo, simbolo de militaj detruoj kaj atombombaj viktimoj. Dum sia ĉi-jara japana vojaĝo, vizitis ĝin ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi teksto, ĝuste en la tago kiam oni rememoras pri la somera tago, kiam atombombo falis kaj haltigis la vivon ... La teksto estas parto de liaj vojaĝimpresoj priskribita en la libreto "Sayonara, Japanio!" (vidu paĝon 120).



Kaj finfine - Hiroŝimo! La urbo kies tragedio tre kortuŝis min jam kiam mi estis 12-jarulo.

La urbo kuŝas en ebenaĵo, sur delto de la rivero Ota. Ĝia nomo signifas "larĝa insulo". Sur unu insulo situas la Paco-parko, kaj tie okazas ĉiujare la ceremonia programo la 6-an de aŭgusto. Tiun tagon Hiroŝimo estas multe pli interesa por vizitantoj ol dum aliaj tagoj.

La programo ne okazis en ia domo, sed en libera aero, kaj komenciĝis je la oka horo matene. Dum miloj da homoj sidis en seĝoj, sur la scenejo parolis la urbestro de Hiroŝimo, aliaj urbaj oficialuloj kaj reprezentantoj de atombombaj viktimoj kaj iliaj familioj. Sed unue oni pensis pri suferoj de miloj, kiuj en la fatala tago mortis petante akvon. Dek ses homoj alportis po unu ujon da akvo, ĉiu el alia parto de Japanio, por oferti ĝin al la spiritoj de la mortintoj! Oni alportis ankaŭ florkronojn. Je la 8h15, la preciza minuto en kiu eksplodis la bombo, aŭdiĝis sonorilo kaj ĉiuj ĉeestintoj ekstaris por unuminuta silenta preĝo. Poste oni liberigis aron da kolomboj, kiuj iomete flugis super la parko kaj foriris. Parolis ankaŭ unu knabo kaj knabino, oni legis mesaĝojn de la japana ĉefministro kaj de la ĝenerala sekretario de UN. Sed la plej interesa parto estis la 500-membra koruso, kiu kantis la packanton de Hiroŝimo.

La programo daŭris malpli ol unu horon. Ĝi estis tre solena kaj digna. Oni jes rememoris kaj honorigis la viktimojn, sed same multe oni emfazis la valoron de la vorto "paco". Preskaŭ la tuta programo estis en la japana, sed mi ricevis skribitan tekston kun iom

da anglalingvaj klarigoj. La tekston akompanis ankaŭ la instrukcioj por krei paperan gruon. Japanio famas ankaŭ pri kreado de paperaj figuroj, konata kiel paperfaldado - arto "origami".

En Hiroŝimo la origamiaj paperaj gruoj havas kroman signifon: pacon kaj vivon. Ili rilatas al la hiroŝima knabino Sadako Sasaki, kiu en 1945 estis priradiita per la atombombo, sed oni tion ne sciis, ĉar ŝi aspektis tute sana kaj normala. Nur 10 jarojn poste aperis ĉe ŝi la atombomba malsano. La knabino tiam estis 14-jara. Ŝi forte deziris resaniĝi kaj vivi. Ekzistis kredo, ke la deziro povas efektiviĝi, se oni sukcesas falde krei mil gruojn. Ŝi entreprenis la faldadon, sed post kelkaj monatoj ŝi tamen mortis.

Pri tio la aŭstria verkisto Karl Bruckner verkis la romanon "Sadako volas vivi", kiun konas la tuta mondo. Eĉ mia filino havis ĝin kiel devigan legaĵon en la lernejo. Li skribis, ke Sadako faris 990 gruojn, do malmultaj restis ĝis esperata resaniĝo. Sed en Interreto mi ofte legis, ke nur 664 ŝi faris, kaj post ŝia morto ŝiaj geamikoj faris la reston. Estas ankaŭ la tria versio, kiu diras, ke ŝi fakte faris mil, kaj

komencis fari novajn mil. Kiom precize da ili ŝi sukcesis fari, oni ne scias, ĉar la familio ne emis nombri, sed eble 1.300. Traleginte ĉiujn, oni povas konkludi, ke la tria versio estas la ĝusta.

En la Pac-parko mi vidis la monumenton pri Sadako: knabino staranta sur sonorilo kaj tenanta en la manoj super la kapo gruon. Multaj homoj ĝin observis kaj fotiĝis. Unu grupo da studentoj alportis grandan, 2-3 metrojn longan, paperan gruon kaj ankaŭ fotiĝis.

Ankaŭ aliaj aferoj estas vidindaj en la Parko kaj apude. La cenotafo (simbola malplena tombo) kun arkoforma tegmento. Ĝi entenas librojn kun nomoj de ĉiuj mortintoj pro la atombombo. Proksime estas eterna flamo, kiu ĉesos bruli nur tiam, kiam ne plu estos nukleaj armiloj en la mondo. Mi ne esperas, ke ĝi iam ajn estingiĝos, ĉar homoj inventas ĉiam pli novajn kaj terurajn armilojn... Inter pluraj monumentoj, dediĉitaj al iu speciala grupo de atomviktimoj, mi vidis tiun de koreaj sklavlaboristoj. Jes, 10-20 mil da ili pereis en Hiroŝimo! Koreujoj tiutempe estis japana kolonio, kaj dum japanoj militis, koreoj perforte





estis venigitaj por labori. Ili amase pereis en tiu milito, kiu tute ne estis ilia milito! La monumento dum multaj jaroj staris ekster la Parko, ĉar ili ne estis japanoj! Sed hodiaŭ, ĝi troviĝas sur digna loko interne de la Parko.

Mi forlasis la insulon trans stranga "T"-forma ponto, kaj venis al la Atombomba domo, tiu tutmonde konata kupolo kun kelkaj muroj. La ruino estas ĉio, kio restis el la tre granda kaj bela palaco de la organizo por industria evoluo. Ankaŭ ĝi estas monumento de UNESCO. Tre proksima al la kupolo estas iu tabulo, sur kiu mi legis, ke la bombo eksplodis precize super mia kapo, en la alto de 500 metroj. Oni supozas, ke ĝuste la T-forma ponto estis uzata de la usonaj soldatoj en la aviadilo, por orientiĝi kien ĵeti la bombon. Pri la bombojetintaj usonanoj cirkulas legendo, ke poste ili sentis teruran konscienciproĉon, havis nervajn problemojn kaj fariĝis ebruloj. Sed la legendo estas tute falsa! Mi bone kontrolis ĉie en Interreto, kaj komprenis, ke ili vivis feliĉe, neniam bedaŭris kaj iu eĉ diris, ke li la saman agon farus denove!

Surstrate en multaj lokoj mi povis vidi grupojn da homoj, kiuj organizis ian stratan eventon, rilatan al la monda paco. Ekzemple, kelkaj knabinoj kolektis subskribojn por paca iniciato. Iuj muzikis kaj kantis packantojn, kaj vendis diversajn paco-objektojn. Kaj el alia loko subite al mi venis voĉoj de koruso: "Estu paco en Rumanio... Estu paco en Svedio ... Estu paco en Turkio...". Angle kaj japane. Per alfabetata ordo de ŝtatoj, per ceremonia rito, la koruso invitis pacon al ĉiu lando de la mondo. Bedaŭrinde, la litero "C" jam pasis, kaj mi ne aŭdis pri "Croatia". Poste la samon ripetis homoj el diversaj landoj, kiuj hazarde troviĝis en la proksimeco, en sia nacia lingvo. Ĉu ankaŭ mi aliĝu? Tamen ne. Sed mi pensis, ke ankaŭ Esperanto meritus

esti uzata...Tia kaj simila bruo kaj homamaso plenis la parkon kaj la urbon apud ĝi.

La muzeo de paco estas apud la ĉefa enirejo en la parkon. En la teretaĝo mi povis promeni apud longa muro kun grandaj fotoj kaj tekstoj, kiuj klarigas la militan historion de moderna Japanio, finiĝinta per la atombombo. Nenie en la mondo oni montras tiom sincere, simple, klare kaj komplete! La historio montras kreskon de militismo en Japanio, atakon al Manĉurio en 1931 kaj al Ĉinio en 1937. Oni vidas, kiel ka gvidantoj preparadis la propran popolon por militoj. Ili eĉ instruis ĝin rezigni pri la "sennecesa lukso" en la vivo, nur por fortigi la armeon. Eĉ la venkoj ne ĉiam alportis bonon al simplaj homoj! Kaj post grandaj militaj sukcesoj de Japanio, venis perdo de ĉiuj konkerajoj, usona sovaĝa aera bombado de ĉiuj japanaj urboj, la atombomboj (Hiroŝimo, la 6-an de aŭgusto; Nagasako, la 9-an de aŭgusto). Post unu semajno Japanio kapituacis, sed intertempe ankaŭ Sovetio atakis ĝin kaj okupis iujn insulojn.

La sama ekspozicio klarigas, kial la bombo estas uzita, kial ĝuste kontraŭ Hiroŝimo kaj Nagasako. Estis en la listo ankoraŭ

2 urboj: Niigata kaj Kokura. Komence ankaŭ Kioto estis planata celo, sed en la usona soldataro troviĝis homo, kiu komprenis la grandegan kulturalan valoron de tiu urbo, kaj ĝi forlasis la liston!


Mi vidis kelkmetran grandan foton, kiu montras Hiroŝimon tuj post la eksplodo. Videblas sur ĝi, ke je kelkaj kilometroj restis nur 5-6 domoj, ankaŭ ili severe trafitaj. Sur la unua etaĝo de la muzeo estas ekspoziciitaj objektoj, kiuj troviĝis en la detruita urbo, kaj montras forton de la eksplodo. Mi memoras betonan muron, kiun defektis fenestra vitro. Kaj botelojn el vitro, kiuj pro la varmego tute ŝanĝis sian formon. Troveblas ankaŭ murpeco, sur kiu estis spuroj de la "nigra pluvo", la hiroŝima fenomeno! Temas pri la venena kaj radioaktiva pluvo, plena de polvo el la detruita urbo. Homoj kiuj travivis la eksplodon, sed poste la "nigra pluvo" malsekigis ilin, poste mortis. Mi vidis japanan gvidanton, kiu montris al grupo da lernantoj modelon de Hiroŝimo post la eksplodo. Ŝi prezentis ankaŭ pupojn, kiuj aspektas kiel atomvunditoj - iliaj manoj etenditaj antaŭen, kaj la haŭto degelis kaj pendis. Ankaŭ la historion pri Sadako ni povis vidi detale en filmo.

Tiu tago pensigis min pri milito kaj paco. Ankaŭ pri nombroj. En Hiroŝimo mortis komence eble 80 mil homoj, kaj poste la nombro verŝajne atingis 150 mil. Kaj la vivo revenis al Hiroŝimo: antaŭ la bombo ĝi havis 400 mil loĝantojn, kaj hodiaŭ - unu milionon! Sed ankaŭ en ne-atoma bombado de Tokio en 1945 usonanoj mortigis 100 mil homojn. En la grava trimonata batalo por Okinavo pereis 80 mil japanaj kaj usonaj soldatoj. Sed sciuj ankaŭ, ke en la masakro en la ĉina urbo Nanjing (1937) japanoj mortigis eble eĉ 300 mil civilulojn!



PRI FEMINISMA GAZETO

Al gamo da gazetoj posedataj, eldonataj, administrataj aŭ redaktataj de LF-Koop apartenas ankaŭ la feminisma gazeto "Femina", kies 11-a numero aperis septembre sur 26 paĝoj. Cefredaktas ĝin Perla Martinelli, kaj al la plej freŝa numero kontribuis krom la redaktorino ankaŭ: Elena Poniatowska, Marie-France Conde Rey, Justine Mintska, Chiara Macconi, Leen Deij, Blanca Vilela Fernandez, Maĝorzata Handzlik, Giorgio Silfer, Bertil Nilsson, Marc'èlle Deschamps k.a. Jara abono kostas 22 eŭrojn. La revuon posedas Feminisma Esperanta Movado.



La aŭtoro Andreas Künzli kun sia verko

libro, kiu prezentas la ideon de universalaj lingvoj, interplektante la diversajn projektojn, ĉar ja la historio de "artefaritaj" lingvoj ne komenciĝis per Esperanto, kaj la adeptoj ofte migris de unu projekto al alia. Kvankam la esploro estis limigita al Svislando, la libro tamen donas pli vastan superrigardon pri la elektita temo. La libro certe apartenas al tiuj, kiun devus posedi ĉiu serioza esperantisto. Malgraŭ sia alta prezo (66,00 eŭroj ĉe UEA-libroservo), la aĉetaĵo certe valoras la elspezon.

LINGVA FESTIVALO EN KOPENHAGO

La 15-an de septembro en Kopenhago (la duan fojon) okazis la Kopenhaga Lingva Festivalo, kiu celis ebligi konatiĝon kun kelkaj lingvoj de la mondo. La evento deziras fariĝi tradicia, kun certeco reokazi en 2008, la jaro proklamita de Eŭropa Unio kaj Unuiĝintaj Nacioj lingvorilata. La Festivalo estis kunorganizita de Konversacia Esperanto-Klubo de Kopenhago kaj la Gronlanda Domo, kies reprezentantoj interkonatiĝis en la pasintjara Festivalo, organizita de esperantistoj mem. Okazis foiro en la Gronlanda Domo kun libroj, periodaĵoj, sonbendoj, kuiraj specialaĵoj diverslandaj

kaj muziko. Paralele okazadis prelegoj. Elstarigi oni devas la fakton, ke esperantistoj en Tuluzo (Francio) en 1987 lanĉis la ideon pri lingvaj festivaloj. Tamen, nuntempe ili ne estas Esperantaj festivaloj, kaj Esperanto ne ludas elstaran rolon en ili. Lingvaj festivaloj, ĝermintaj el la esperantista ideo disvastiĝis tra la mondo meze de 1990-aj jaroj, sed ĝenerale ili estas organizataj de ŝtataj aŭ edukaj institucioj.



Nova prezidanto de la Akademio: John Wells

ESTRARO DE LA AKADEMIO

La 14-an de septembro publikiĝis la rezultoj de la estrar-elekto de la Akademio de Esperanto. Voĉdonis 42 el 45 akademianoj. La prezidanto elektiĝis John Wells, vicprezidantoj Probal Daŝgupta kaj Brian Moon, dum la direktoroj de la sekcioj fariĝis: Marc Bavant (lingvo), Jouko Lindstedt (gramatiko), Bertilo Wennergren (ĝenerala vortaro), Marc Bavant (kontrolado de lerniloj), Boris Kolker (lingva Konsultejo), Humphrey Tonkin (literaturo), Probal Daŝgupta (prononco) kaj Carlo Minnaja (historio de la Akademio). Ĉiuj estraranoj kaj sekciestroj estas viroj. El la 45 akademianoj, 28 loĝas en Eŭropo, 10 en Azio, 5 en Ameriko, 1 en Afriko kaj 1 en Oceanio. Nur 6 el la akademianoj estas virinoj.



UNIVERSALAJ LINGVOJ EN SVISLANDO

Dek kvin jarojn daŭris la verkado de la enciklopedia verko, kiun en 2006 publikiĝis la svisa aŭtoro Andreas Künzli sub la titolo "Universalaj lingvoj en Svislando". Temas pri ampleksega (1129-paĝa), du kilogramojn peza libreto, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj planlingvoj (Volapuko, Ido, Occidental/Interlinue kaj Interlingua). La priskriboj estas kompetentaj kaj objektivaj, analizaj kaj dokumentaj, alfabeto ordigitaj, kun multaj referencoj. Ŝajnas, ke ĝi estas la sola ĝis nun aperinta

SVEDA POLITIKISTO PLEDIS POR KOMUNA LINGVO DE EŬROPA UNIO

Sub la titolo "Eŭropa Unio bezonas komunan linva franca" aperis la 13-an de aŭgusto en la plej granda matena ĵurnalo de sveda Svedio "Sydsvenska Dagbladet" ampleksa artikolo de sveda politikisto Per Gahrton. Li estas unu el la fondintoj de la sveda verdula partio kaj multjara parlamentano de Eŭropa Unio. Laŭ la artikolo, li opinias, ke la taŭgaj alternativoj por komuna lingvo de Eŭropa Unio estas la franca, latino aŭ Esperanto. Laŭ lia opinio, Esperanton aŭ latinon eblus enkonduki ene de unu aŭ du generacioj, la francan multe pli rapide. La artikolo aperis en videbla loko apud la ĉefartikolo, kaj ĝi aliĝis al la aktuala debato pri la rolo de la sveda kaj angla lingvoj. Duonmonaton pli frue, profesoro Marian Radetzki, en la prestiĝa sveda ĉefurba ĵurnalo "Dagens Nyheter" proponis, ke svedoj forgesu la svedan kaj adaptiĝu al la angla. Fine de julio la debaton daŭrigis Emily von Sydow, la sveda ĵurnalistino en Bruselo, pledante por la sveda lingvo en "Sydsvenska Dagbladet" kaj atentigante pri la mankoj de la komunikado, al kiu gvidas la uzo de aĉa angla lingvo en institucioj de Eŭropa Unio, kaj aparte akcentis, kiel grava estas la interpretado al kaj el la sveda. Per Gahrton konstatis, ke interpretado evidente gravas se temas pri formala, publika parolado. Li ankaŭ kontraŭstaras la ideon havi komunan identecon de eŭropanoj, opinianta, ke ĝi estos malbona kopio de Usono. Se oni volas seriozi pri eŭropa identeco, diferenca de la usona, ĉu oni ne devas tuŝi la plej doloran punkton en la tuta sistemo de Eŭropa Unio: la lingvon? Ĉar el multaj flankoj oni atentigas, ke lingvo estas identeco, li skizis kelkajn alternativojn: 1. Oni povas renovigi iun malnovan lingvon, kiel tion faris Israelo. Ĝi povus esti la iama internacia lingvo: la latina. 2. Oni povas elekti tute



artefaritan lingvon, kio donas ŝancon al Esperanto. 3. Oni povas elekti la jam ekzistantan lingvon de Eŭropa Unio. En tiu kazo, apenaŭ iu lingvo povus konkurenci kun la franca. 4. Oni povus kapitulaci antaŭ la libera merkato kaj akcepti superregon de la angla. Tamen, laŭ lia opinio, ankoraŭ ne estas malfrue haltigi la anglan lavangon en Eŭropa Unio. En la komplika lingva labirinto, multaj tamen preferas fari nenion.

UEA-KOTIZOJ EN 2008

MG	Individua Membro kun Gvidlibro - 5,00 eŭroj
MJ (-T)	Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj kun TEJO-membreco kaj abono al revuo "Kontakto") - 12,00 eŭroj
MA (-T)	Individua Membro kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" - 29,00 eŭroj
DM (-T)	Dumviva Membro kun "Jarlibro" kaj revuo "Esperanto" (kaj ĝis inkl. 29 jaroj kun TEJO-membreco, "Kontakto" kaj "TEJO tutmonde") - 725,00 eŭroj
DMJ (-T)	Dumviva membro kun "Jarlibro" (kaj ĝis inkl. 29 jaroj kun TEJO-membreco, "Kontakto" kaj "TEJO tutmode") - 300,00 eŭroj
DPat	Dumviva patrono (ricevas eldonaĵojn kiel DM kaj aŭtomate fariĝas membro de Societo Zamenhof) - 7.250,00 eŭroj
PT	Patrono de TEJO (kun revuo "Kontakto" kaj aliaj eldonaĵoj de TEJO) - 87,00 eŭroj
DPT	Dumviva Patrono de TEJO (ricevas eldonaĵojn kiel PT) - 2.175,00 eŭroj
SZ	Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA). La minimuma kotizo estas 58,00 eŭroj
SA	Simpla abono al revuo "Esperanto", sen membreco en UEA - 17,00 eŭroj
Kto	Abono al "Kontakto", sen membreco en UEA/TEJO - 10,00 eŭroj
TT	Abono al "TEJO tutmonde" sen membreco en TEJO - 6,00 eŭroj

Konsideru, ke por akiri la plej malmultekostan aliĝperiodon por Universala Kongreso (limdato: 31-a de decembro), oni devas pagi ankaŭ la membrototizon ĝis tiu dato. Se vi planas kongresumi en 2008, jam nun kontaktu la Ĉefdelegiton por Kroatio:

Boris Di Costanzo, Ŝet. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija
Telefono/Faksilo: 051/715-309, Rete: boris.di-costanzo@ri.htnet.hr
 Laŭ la ĝis nun akiritaj informoj, Faruk Islamović, kiu tradicie organizis la kongresajn karavanojn de Kroata Esperanto-Ligo, en 2008 ne povos dediĉi sin al tiu tasko. Venis fidindaj informoj, ke la karavanon al kiu povas aliĝi ankaŭ kroatoj, organizos "Orbis Pictus" de Viŝnja Branković el Triesto. Detalaj informoj sekvos.

KIO NOVAS EN TEJO?

La kuranta jaro por Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estis tre eventoriĉa. La 63-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Hanojo, en Vjetnamio, nesufiĉe konata lando sur la Esperanta mapo. La kongreslando ŝajne estis bone elektita, ĉar en Vjetnamio la junulara Esperanto-movado intense progresas, evidente ankaŭ dank' al la ĉi-jara IJK. La ĉeestintoj de la IJK en Hanojo atestas pri la sukcesa evento kun 200 kongresanoj el 35 landoj, kion nur iomete ombrumis la postkongrese lanĉita falsa informo de la vjetnamia novajagentejo VNA, ke vjetnama reprezentantino Nguyen Thi Minh Nguyet elektigis prezidento de TEJO. La malgusta informo estis refutita, ĉar evidente temas pri elekto por prezidento de Vjetnama Esperantista Junulara Organizaio (VEJO), kio la ĵurnaliston konfuzis.



Tamen, iaj ŝanĝoj en TEJO okazis. La 2-an de septembro demisiis la ĝistiamia prezidento David-Emil Wickström, klarigante sian demision per familiaj kaj laboraj aferoj. Novaj prezidento kaj estraro de TEJO efektive devis esti elektitaj en Vjetnamio dum la IJK, sed pro manko de kvorumo, tio ne okazis. La malnova estraro do devos ofici ĝis la komitato de TEJO povos fizike kunveni, ĉar aliaj (interreta aŭ letera) elektoj ne validas laŭ la regularo de TEJO. Plej malfrue tio devus okazi ĝis la fino de 2007, supozeble en unu el la jarfinaj junularaj aranĝoj. David-Emil Wickström cetere estis elektita



Wickström kaj Subašić, la malnova kaj nova prezidentoj de TEJO

en la IJK en Sarajevo pasintjare. Ankaŭ lia antaŭulo Heming Welde Thorbjørnsen demisiis el la prezidanta posteno post nur unujara ofico.

La demisiintan Wickström anstataŭigis Haris Subašić, la ĝisnuna vicprezidento, naskiĝinta en 1981 kaj loĝanta en Bosnio. Li estas studento pri komputiko kaj ekonomiko, okupiganta pri la projektoj E@I, Pasporta Servo kaj eksteraj rilatoj de TEJO.

Ĉiuj konsentas, ne nur en TEJO, kaj ne nur en la medioj proksimaj al UEA, ke la ĉefa atingo de TEJO dum la pasintaj jaroj estas akiro de jura personeco, kio permesas pli facile memstare interrilati kun oficialaj instancoj kaj peti subvenciojn. Ankoraŭ ne realiĝis la planita pagita oficisto de TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo, sed la afero ŝajnas tre probabla.

En 2008 TEJO jubileos la 70-an datrevenon, sed nur antaŭ nelonge oni eksciis kie okazos la tiujara IJK, ĉar pri eventuala okazigo de la kongreso en Roterdamo, samtempe kun la Unuversala Kongreso, TEJO ne diskutis. La lasta informo pri IJK estas, ke ĝi okazos en Szombathely (Hungario), senpere post la UK, inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto. Konfirmo de tiu informo lanĉita de hungaraj esperantistoj troviĝas en la retejo de TEJO.


En la tuta TEJO-situacio, tamen la organizaĵo mem tute bone fartas finance kaj materie. La lasta jarkalkulo montris aktivon de 23.805 eŭroj,

dum la kapitalo superis cent mil eŭrojn. La bona financa stato dependas grandparte de la eŭropinstituciaj subvencioj, kiuj, kiel jam dirite, pli facile akireblas, dum la membrotizoj egalas al ne pli ol 10 procentoj de la buĝeto. La membronombro, estinta 892 personoj en 1997, malkreskis al nur 399 en 2003, sed dum la prezido de Bertrand Hugon stabiĝis ĉe pli ol 500 individuaj membroj. Ni ekdeziru bonan venton al veloj de TEJO ankaŭ estonte.



La aliĝdato por la jaro 2008 estas la 1-a de novembro. Se vi malfruis aliĝi, certe restis sufiĉe da tempo por uzi la servojn de Pasporta Servo. Atendas vin pli ol 1300 gastigantoj en la tuta mondo!

SEP ALBENAJ KONGRESAJ KAJ AMUZE-ĜUAJ TAGOJ



✍️ Antun Kovač

En sia ĉi-jara, 73-a laŭvice, *Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj* (IKBE), esperantistoj el 12 eŭropaj landoj kolektiĝis en la fama bulgara turisma centro Albena, de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto. *Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj* (KUNE) estis reprezentita per kvinopa delegacio: Antun Kovač, Dragan Štoković, Marija Repac, Branko Repac kaj Marija Kovač (kiel akompananto).

Temo de la ĉi-jara kongreso estis "Esperanto - taŭga rimedo pri kultura integriĝo". Inter la kvar prelegoj rekte ligitaj al la kongresa temo, troviĝis ankaŭ la prelego de Antun Kovač "Kiel kroata literaturo prezentiĝas al aziaj nacioj en Esperanto". La partoprenantoj interesiĝis, ĉu eblus la 6 librojn tradukitajn el Esperanto al lingvoj de kelkaj aziaj popoloj, pri kiuj temis en la prelego, ricevi en sona, brajla aŭ diĝita formo, por ke la blindaj esperantistoj povu memstare legi ilin.

La prelego "Kion povas trovi nevidantaj esperantistoj en la reto" (de Mariana Evlogieva el Bulgario), samkiel prezento de la parola komputilprogramo por Esperanto "Espeak" (de Atila Varró el Hungario), vekis intereson de la ĉeestintoj, ĉar konfirmiĝis, ke la modernaj tekniko kaj teknologio povas grave favori la disvastiĝon de Esperanto. El aliaj prelegoj, la plej interesa estis "Socialaj servoj por homoj kun difektoj en Bulgario" de Veselin Stoilov.

Kiel kutime, dum la kongreso okazis ankaŭ ĝenerala jarkunveno de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), kun la kutima tagordo. Oni taksis, ke Esperanto-movado inter la nevidantoj plue stagnas, ĉar al la movado aliĝas tro malmulte da junaj kaj novaj esperantistoj. Iom pli evoluis la

afero en Serbio, kaj la serba delegacio, konsistinta el 15 membroj (trionon konsistigis junuloj), estis la plej nombra post la bulgara. Verŝajne pro manko de freŝaj fortoj en la lastaj jaroj ĉiam pli evidentas la problemo pri organizado de internaciaj kongresoj, kaj ĉi-foje tio aparte videblis. Nome, la nederlandaj blindaj esperantistoj esprimis maleblecon organizi la 74-an kongreson en Roterdamo, kie sekvontjare okazos la 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Kelkaj ĉeestintoj opiniis, ke estus pli bone, se la nederlandanoj ne volas organizi la 74-an IKBE, okazigi almenaŭ kelkajn renkontiĝojn en Roterdamo enkadre de la UK, kaj oni proponis tian konkludon postkongrese direkti al la nederlandanoj. Ĉi-tiun opinion subtenis ankaŭ la kroata delegacio, kun aldo, ke, se ankaŭ tiu solvo ne eblas, KUNE pretas sekvontjare organizi la kongreson en Kroatio, ĉar ni konscias pri la fakto, ke sen sekvontjara kongreso, la funkciado de blindaj esperantistoj estonte povus stari sub demando.

En la kongresa programo estis organizitaj ankaŭ du onttagaj ekskursoj: al Balčik (najbara turisma centro, ne tiom atrakcia kiel Albena), en kiu estis vizititaj botanika ĝardeno, palaco de la rumana reĝino Maria kaj potfarejo, kaj al Varna, kun vizito al prabulgara setlejo Fanagoria, parko-muzeo Vladislav Varničik kaj Katedrala templo de Sankta Dipatrino.

Por la kongresanoj estis organizitaj ankaŭ tri kulturaj programoj: kulturprogramo okaze de la 100-a datreveno de Esperanto en Bulgario kaj inter la blinduloj (kun sci-konkurso pri la Esperanto-movado); programo kun partopreno de membroj de Kulturcentro de nevidantoj el Varna kaj Internacia Vespero, dum kiu per kelkaj Esperantaj recitaĵoj prezentiĝis ankaŭ Branko Repac.

Ĉar la kongresprogramo ne estis tro ampleksa, la tagoj pasigitaj en Albena ne fariĝis nur laboraj, sed ankaŭ amuze-ĝuaj, kun eblecoj amuziĝi kaj malstreĉiĝi, speciale ĉe la nigramara sabla strando kaj en la marondoj.

La 73-a IKBE arigis 112 partoprenantojn el 12 landoj, el kiuj pli ol duonon konsistigis bulgaraj esperantistoj.

Petar Preradović (1818-1872)

DEMANDO

*Vento al mi fenestre alblovis,
kiam ĝuste mi al vi skribetis,
verdfolion kiun ĝi falmovis
al vort' unu kiun mi formetis.*

*Mi viŝis vorton kun "amo"-nocio,
ĉar ja spaco en leter' ne estis.
- Ĉu bandaĝis vundon ĉi-folio,
aŭ de nia amo tombon vestis?*

Esperantigis: Boriša Milićević

KIEL ESTIĜAS LA INTERKULTURA SERIO "TRA LA MONDO"

≈ Raita Pyhälä


"Vivoj tra la Mondo"; la unua eldono (2007)

Aŭtoroj: Membroj de "Ĉenraportoj"

Redaktisto: HORI Jasuo - Eldonejo: HORIZONTO

Prezo: 6,7 eŭroj + sendokostoj

Mendebla ĉe: hori-zonto@water.sannet.ne.jp



Japana Esperanto-verkisto Hori Jasuo havis ideon inviti esperantistojn el multaj landoj verki pri la vivo en siaj landoj. Li proponis temojn, unue la monatojn de la jaro, kaj tiel estiĝis la libro "Monatoj tra la Mondo", kie diverslandaj esperantistoj rakontas pri la sezonoj kaj laŭkalendaraj festoj sialandaj. Poste Hori proponis temojn pri la fazoj de la homa vivo, kaj estiĝis la kolekto "Vivoj tra la Mondo", en kiu la ĉapitroj nomiĝas *Naskiĝo, Infanoj, Lernantoj, Studentoj, Plenkreskuliĝo, Laboristoj, Kumuloj, Geedziĝa Festo, Gravaj festoj (en ĉies persona vivo), Pensiuloj, Handikapuloj, Maljunuloj, Morto, Post la Morto*. La aŭtoroj estas el Francio, Hungario, Japanio, Serbio, Kongo, Ĉinio, Finnlando, Vjetnamio, Rumanio. Plejparto el ili sendis siajn verkaĵojn per retpoŝto unu al la aliaj kaj al s-ro Hori. Se iu ne havas aliron al retpoŝto, li/si sendis paperan leteron, kiu iu alia tajpis komputile kaj enretigis. La libron "Vivoj tra la Mondo" finas Esperanta traduko de poemo de M.E. Frye, verkita por konsoli tiujn, kies amiko aŭ parenco mortis. La poemo aldonas esperplenan noton al la kutimoj kaj moroj rilataj al nia forpaso. La nivelo de la lingvo varias laŭ ĉiu raportisto. S-ro Hori ne multe korektis, nur la plej evidentajn lingvajn erarojn li ĝustigis. Li ankaŭ aldonis antaŭparolon kaj kelkajn fotojn el la koncernataj landoj kaj kulturoj. Ĉe la adreso cxenraporto@yahoo.com. jp s-ro Hori daŭre kolektas pliajn raportojn el pliaj landoj, ekzemple pri mangajoj, legomoj, fruktoj, dorlotbestoj, muziko kaj arto, lingvoj, eksterlandaj lingvoj en lernejo, historio, politiko, nuna plej grava socia afero. Aligu al la raportistoj, se vi povas ion rakonti pri via lando. La serio "Tra la Mondo" montras al ni interesajn kulturajn diferencojn kaj ĉiutagajn malsamajn, sed ankaŭ niajn komunajn ecojn.

Dobriša Cesarić

AŬTUNO

Ĝi estas tie. En pluva tristo silente pasas tra l' kampa ŝlim', venante jen, ĝi supren trenas cikoniaron en arda tim'.

Lante al monto grimpas ĝi, kaj vasta kampa voj' alvala pro la folioj mortaj flavas, al valo pasas greg' animala.

De lag' forprenis ĝi kvieton, kaj la fundo ne plu videblas, la urs' vidita ĉe voja rando pri vintra dormo reve feblas.

Se tra herbejoj blovas ĝi per vento, jen la herboj lastas. La stopla kamp' sen gaj' susuras sen neĝo la monedoj hastas.

Laŭvoje velka arbfolio pro miro flugas: jen mi saltas! Mantelvolvita hom' survoje jen pasas, jen gape haltas.

Tradukis: Josip Pleadin

APERIS "BELETRA ALMANAKO"

La unua numero de "Beletra Almanako" (redaktita de Jorge Camacho, kaj eldonita de "Mondial" - Ulrich Becker en Usono), kiu celas almenaŭ parte anstataŭigi la ĉesintan revuon "Fonto", ĵus aperis. En la unua numero aperas diversspecaj kontribuoj: originala prozo (de Luiza Carol kaj Den Drown), originala poezio (de István Ertl, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Mao Zifu, Mauro Nervi, Baldur Ragnarsson), tradukita prozo (Mircea Eliade /tradukita de Ionel Onet/ kaj Halldór Laxness /tradukita de Baldur Ragnarsson/), tradukita poezio (Bokusui Ŭakajama /tradukita de Tacuo Huĝimoto/ kaj Sankha Ghosh /tradukita de Probal Daĝupto/), eseoj (de Baldur Ragnarsson kaj Jorge Camacho) kaj recenzoj (verkitaj de A. Melnikov kaj J. Camacho). La "Almanako" alportas ankaŭ premiatajn de Uta-festo de Oomoto kaj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA. Ampekso: 176 paĝoj. Formato: 8.25" x 5.25" (21 cm x 13,3 cm). ISSN: 1937-3325. Mendebla ĉe la libroservo de UEA. Prezo: 10,20 eŭroj.

Beletra Almanako
 N-ro 1 (Septembro 2007)
 ISBN 978-1-59569-071-5 / ISSN 1937-3325

Redaktas Jorge Camacho (ĉefred.), Probal Daĝupto, István Ertl

<p>La verkaĵoj de la Belartaj Konkursoj 2007 de UEA, la verkaĵoj de la Uta-festo 2007 de Oomoto.</p> <p>Kaj krome: Originala poezio kaj poentradukoj de</p> <p>Originala prozo</p> <p>Prozotradukoj</p> <p>Eseoj</p> <p>Recenzoj</p>	<p>"...Mi baros same rimovon, ĉiunkiam kantinton rian. Ne forĝe ĝi atenas konstrui la ombro pri ĉiu ni ne scias..."</p> <p>Kaj krome: Edwin de Kock, en: Pri kiel kaj F'aturo</p> <p>Probal Daĝupto, István Ertl, Tacuo Huĝimoto, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Mao Zifu, Mauro Nervi, Baldur Ragnarsson</p> <p>Luiza Carol: Ĉu vi scipos iadi Tamlundilano? - Den Drown: Fibroakaj kaj alĝitroj</p> <p>Ionel Onet (La kromaj de ĉi-jaranta ĵurnalo de Mircea Eliade) - Baldur Ragnarsson (Gara Erdmundo en pufilo, el Sendependaj Homoj de Halldór Laxness)</p> <p>Jorge Camacho: Lingvaj manipulaĵoj - Baldur Ragnarsson: La libera linio</p> <p>Jorge Camacho: (Kantaj de Antaŭ de Mao Zifu) - Valentin Melnikov (Vivaĵoj en Esperantolando de Berta Kocler)</p>
--	---

NOVJORKO www.libroj.es





74^a ITALA KONGRESO DE

esperanto

Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando

Pisa, 31a de aŭgusto - 7a de septembro 2007



BONSUKCESA ITALA ESPERANTO-KONGRESO

En la historia urbo Pisa (Pizo), fame konata pri la Klina turo, okazis la 74-a Itala kongreso de Esperanto (de la 31-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro ĉi-jare). La kongresa temo estis "Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando".

La ĉi jara programo estis tute nova aranĝo kompare kun la pasintjaraj kongresoj de Itala Esperanto-Federacio. Fakte,

estis rezervitaj du tagoj por la kongresaj tradiciaj laboroj (inaŭguro, IEF-sembleo, fakaj kunvenoj), tri tagoj por altnivelaj kursoj kaj seminarioj kaj du tagoj por ekskursoj.

Aliĝis al la kongreso pli ol 150 personoj, inter kiuj pluraj eksterlandanoj.

La inaŭguro okazis en la Universitata ĉefsalono. Post la bonvenigaj vortoj de IEF-prezidanto, profesoro Grassini, sekvis nome de la urbestro la saluto de la skabeno pri kulturo, kiu substrekis la gravecon de la Internacia Ligvo. Pri la kongresa temo prelegis Esperanto-akademiano, la islanda profesoro Baldur Ragnarsson.

Dum la sekvaj kongresaj tagoj okazis pluraj kunvenoj, kursoj kaj ekzamenoj pri instruado, seminarioj pri literaturo kaj informadiko, gvidataj de internacie spertaj instruistoj: Paul Gubbins (Britio), Kristin Tytgat (Belgio), Katalin Kováts (Nederlando), Baldur Ragnarsson (Islando), Nicola Minnaja, Mauro Nervi kaj Nicola Ruggero (Italio).

Okazis ankaŭ interesaj prelegoj: Tereza Kapista (Serbio) parolis pri "Mia Afriko", pri informadiko parolis



Mario Amadei

Della Rovere kaj Imbrenda. Prezentoj de novaj libroj, precipe la plena verkaro de profesoro Baldur Ragnarsson, eldonita de Edistudio el Pisa sub la titolo "La lingvo serena", vekis multe da intereso inter la kongresanoj. Ankaŭ aliaj novaj libroj estis prezentitaj, pro kio la libroservo ĉi-jare havis aparte abundan oferton.

Dum la jara asembleo de la IEF oni elektis la novan estraron. Kiel prezidanto de IEF por la jaroj 2006-2008 estis elektita la ĝis antaŭnelonga UEA-prezidanto Renato Corsetti.

Ne mankis en la riĉa programo koncerto, teatraĵo kaj distraĵo aranĝoj. La interesaj kaj agrablaj ekskursoj en la regiono Toskano finis la kongreson.

Slovena parlamentano Marko Pavliha transdonis kongresan findokumenton de EEU al la parlamento

Zlatko Tišljar

Doktoro Marko Pavliha transdonis la 31-an de aŭgusto 2007 la findokumenton de la EEU-kongreso okazinta en Maribor en kiu la kongresanoj petas slovenan registaron: a) subteni iniciaton de slovaka vicprezidanto Ĉaplovič postuli de Eŭropa Komisiono trakti je interregistara nivelo eŭropan lingvan politikon, b) proponi al Eŭropa Komisiono fondon de nova fondaĵo kiu financus projektojn de nefortaj neregistaraj organizoj rilataj el poreŭropa edukado,

c) proponi al Eŭropa Komisiono eksperimentan volontulan edukadon en eŭropaj lernejoj pri eŭropa identeco kaj valoroj kies parto estus lernado de Esperanto, d) dum sia prezidado de Eŭropa Unio en 2008 uzi en informado interalie ankaŭ Esperanton kaj e) rekomendi al Eŭropa Komisiono konsideri la propedeŭtikan valoron de Esperanto kiel lernfaciligilo por lernado de fremdlingvoj en EU. Slovenlingve la tuta propono estas legebla ĉe: <http://www.marko-pavliha.si/SLO/Pobude/2007-08-31.html>

Doktoro Pavliha jam transdonis en novembro pasintjare samtipan proponon al la slovena parlamento petante pri iniciato priskribita en c) de la supra iniciato. Krome li intervenis en debato en la slovena parlamento pri nacia strategio por la slovena lingvo la 7-an de majo 2007 en kiu li subtenis la ideon uzi internacajn nivelo en EU Esperanton. (<http://www.marko-pavliha.si/SLO/Pobude/2007-05-07-01.html>).

La poemojn de L. L. Zamenhof tradukis en la kroatan Niko Bubalo. Ili aperis en "La Provo" n-ro 2/1921 (La Espero) kaj n-ro 4/1921 (ĉiuj aliaj). La tradukoj restis ĝenerale nekonataj, kaj ni uzas la okazon (re)publikigi ilin renkonte al Zamenhofa tago.

NADA

(La Espero)

Na sv'jet novo osjeĉanje doĉe,
Jaki glas se razliježe sv'jetom;
Sad na lakim krilima nek poĉe
S mjesta k mjestu zefirovim letom.

Ĉovjeĉanstvo miŝo ta ne vuĉe
Krovoĉednom maĉu, - nego sv'jetu,
Ŝto je vjeĉno ratovoĉo do juĉe,
Obeaĉje mir i slogu svetu.

Sve pod svetim znakovima nade
Mirni borci na okupu stoje -
I gigantski stvar se ŝirit stade
Radom onih, koji nadu goje.

Ĉvrsto stoji ziĉe tisuĉljeto
Razd'jeljenim meĉu narodima,
Al ĉe prsnut sve zapreke sretno,
Sveta ljubav kad zavlada njima.

Na temelju r'jeĉi nepristrane,
Kojom ĉe se svi razumjet lako:
Narodi ĉe, kad sporazum svane,
Obiteljsko stvorit kolo jako.


Ti marljivi naŝi sudrugovi
U mirnome radu sustat ne ĉe,
Dok se l'jepi ĉovjeĉanstva snovi
Ne pretvore u dan vjeĉne sreĉe.

OJ SRCE, STAN'! ...

(Ho mia kor'! ...)

Oj srce, stan'! Ne tuci tako jako.
Iz grudi mojih sad ne skaĉi van!
Ne mogu veĉ suzdrzati se lako,
Oj srce, stan'!

Oj srce, stan'! Zar iza duga rada
Pob'jediti ne ĉu u odluĉni dan?! -
Ah, dosta! Smiri se pa snivaj sada,
Oj srce, stan'!



PUT

(La Vojo)

Kroz duboku tamu naŝ cilj se bjelasa,
Kud srca koraĉamo smjela,
I poput zvjezda za ponoĉnog ĉasa,
Pokazuje put nam k'o str'jela.
Nas ne plaŝe noĉni vukodlaci hudi,
Ni udarci sudbe, ni rугanje ljudi,
Jer jasan i prav je i odreĉen za nas
Put, koji odabrasmo danas.

Svi odvaŝno samo i s nadom u duŝi
Po poznatom poĉimo putu!
I siĉuŝna kaplja, kad dube i buŝi,
Probuŝit ĉe peĉinu krutu.
Ustrpljivost, nada i otporna sila -
To troje ĉe podat nam zanos i krila
I mi ĉemo borbom do pobjede prave
Dokopat se cilja i slave.

Mi sijemo, sijuĉ i umor nas mine,
Buduĉnost nam okrepu ŝalje.
I sto nam i tisuĉu sjemenki zgine -
Mi sijemo, sijemo dalje.
"O preŝtan' te!" s porugom svjetuju ljudi
"Ne preŝtan', ne preŝtan'!" glas zvoni iz grudi:
"Tvrĉoglavo napred! Izdrz'ite smjelo
Potomstvo ĉe krunit vam ĉelo!"

PJESMA SAVEZA

(Kanto de l' Ligo)

Braĉo, svi si ruke dajmo
Pa bez brige proslavljajmo
I bez boli l'jepi ĉas!
Sve zemaaljsko zbacit treba,
Nek se ĉuje, dok je neba,
Naŝe divne sloge glas,
Naŝe divne sloge glas!

Ĉast i dika Bogu budi:
Ta ĉemu nam ŝarke grudi
I boŝanskog duha let?
Po istini svjetlo traŝit,
To nek bude cilj nam svet,
To nek bude cilj nam svet.

Ljudi, ŝto vas istok grije,
Ljudi, ŝto vas zapad krije,
Blagi jug i sjever ljut!
Ljudŝku duŝu cijenit pravo,
Svagog brata ljubiti zdravo -
To nam svima geslo bud',
To nam svima geslo bud'!



BRAĆI

(Al la fratroj)

Odvažno, braćo ljubljena, stojmo
Za našu misao svetu!
Nadu u borbi dižmo i gojmo,
Nek složnu kr'jepi nam četu!

Carstvuju jošte duboke tmine,
Tvrđglavo svijet još snije,
Ali će skoro sunce da sine,
Da vječno sv'jetli i grije.

Budite - buditi dužnost vam budi,
Ma što vam pogrdna rekli!
Zovite, zov'te punih iz grudi,
Dok niste posluha stekli!

Deset će puta uzalud proći
Vaš poziv s poruge sl'jepe,
Ali će glas jedanaesti doći -
I rađat plodove l'jepe.

Vrlo daleko grad je od grada,
Nas d'jele gore i vode ...
Gdje ste, mi, što li radite sada,
Oj braćo, mili moj rode?

Vama u gradu, vama sa sela
I vama u mjestu svakom:
Nije l' odvažnost prhnula c'jela
Ko perce na vjetru lakom?

Vodite l' naše s uspjehom stvari
U svome roenom gradu,
Il' je već klon'o zanos vaš stari,
Te sad izgubiste nadu?

Da li su vaši uspjesi češći,
Dok nada zapreke ruši?
Bukti li žar sve jači i žešći
U vašoj zanosnoj duši?

Odvažno napred, kud nam je meta -
U vrtlog truda i rada!
Nek nam ideja raste i cvjeta
I sv'jet nek po nama svlada!

Mi ćemo s njom bez počinka poći
I niš' nas ne će umoriti;
S njom ćemo c'jelim svijetom proći
I svud joj vrata otvoriti.

Sve ćemo smetnje redom razgraditi,
Na našoj dignute stazi,
Bez straha sve smo spremni poraditi,
Što bude u našoj snazi.

Cilj nam je još u tami i noći,
S daleka sja se iz zrcra,
Mi ćemo do njeg borbama doći
I snagom odvažna srca.

Mi ćemo do njeg ljubavlju stići
I svetim zanosom, nadom,
Mi ćemo k njemu hrabrošću prići
I našim strpljivim radom.

MOLITVA POD ZELENOM ZASTAVOM

(La preĝo sub la verda standardo)

Pred Tobom, što tajnost ti ovija čelo
Ti Tvorče te svemirske zgrade,
Pred Tobom, sveljubivi, istine vrelo
I vrelo, što vječnost nam dade,
Pred Tobom, kog razno prikazuju ljudim',
Al' svi Te baš jednako čute u grudim',
Pred Tobom, koj stvaraš i skrbiš za nas
Mi klečimo danas.

Mi s narodnom vjerom ne dodosmo k Tebi,
Ni s dogmama zanosa mlada:
Sad vjerskoj se prepirci oštrica prebi,
Religija srca sad vlada.
S njom, što je kod svakoga čovjeka ista
I što je od laži, nadmetanja čista:
Iz svega se sv'jeta tu sabrasmo s marom
Pred Tvojim oltarom.

Ti satvori ljudstvo i krasno i l'jepo,
Al' ono se razdvoji ratom;
Svud narod na narod navaljuje sl'jepo,
Brat na brata udara batom.
Ko bio da bio, Ti neznana Silo,
Glas iskrene molitve poslušaj milo
I ljudskom rodu, što s nemira pati,
Mir vječni povrati.

Kad vjetar nam iskida uvelo lišće
I duga ga popali žega,
Mi hvalimo vjetru, jer društvo je čišće
I snaga ga prožilje svega.
Ne boje se smrti ti sokoli naši
Njih ne straši zastoj, nit vjetar ih plaši
Već borbom, iskustvom okivajuć prsi
Svi smjelo koračaju k svrsi!

Svi odvažno samo i s nadom u duši
Po poznatom podimo putu!
I slična kaplja, kad dube i buši,
Probušit će pečinu krutu.
Ustrpljivost, nad ai otporna sila -
To troje će podat nam zanos i krila
I mi ćemo borbom do pobjede prave
Dokopat se cilja i slave.

Slavna nam svrha, slavnije djelo,
Još čas i - pobjeda sveta;
Mi ćemo dignut s ponosom čelo
I čuti blagoslov sv'jeta.

Tada nas čeka nagrada - cv'jeće
I lorov za naše trude:
Složan naš rad i strpljivost sve će
Na zemlji usrećiti ljude!

MOJA MISAO

(Mia Penso)

Na poljani izvan sv'jeta
Pred noć ljetnu mlada djeva
Prijateljskog kod izleta
O nadanju pjesmu pjeva.

I o žiču raskopanom
Priča ona vlažnih vjeda, -
Stara rana s novom ranom
Krvareći mene vr'jeđa.

"Prijatelju! Spavate li?
Što ste tako ukočeni?
Ah, valjda ste snatrit sjeli
U djetinjskih dana sjeni?"

Što da kažem? Plačnom zboru
Ne bi mjesta - nije druge -
S gospođicom na odmoru
Iza ljetne šetnje duge!

Moja miš'o, moje muke,
Moji jadi, moje nade!
Koliko sam sve bez buke
Za vas dao krvi mlade!

I najdraže što imadah -
Mladost svoju - brišuć oči
Na žrtvenik jedan dadoh,
Gdje se stroga dužnost kočii

U prsima oganj ćutim:
Ta živjeti želim i ja, -
Kad s' u društvo gdje zaputim,
Sve me nešto natrag vija

Pa ako mi rad i muku
Baš zavidi sudba, hola -
Odmah pružam smrtnu ruku
U nadanju - i bez bola!

ZLATA FLEGO (1922-2007)

En aĝo de 86 jaroj la 15-an de septembro 2007 en Zagrebo forpasis veterana esperantistino Zlata Flego. Ŝi estas fratino de la fama aktoro Srdan Flego, fondinto kaj reĝisoro de la Internacia Arta Teatro en Parizo. Ŝi naskiĝis la 15-an de marto 1922 en Volosko (apud Opatija) en Istrio. Profesie ŝi estis ĵurnalistino. Dum sia aktiva ĵurnalista vivo ŝi laboris en redakcioj de kelkaj nacilingvaj gazetoj en Zagrebo: "Vjesnik", "Naprijed", "Kerempuh" kaj en la monata porvirina revuo "Žena". Esperantistino ŝi fariĝis antaŭ 70 jaroj, en la jaro 1937, jaro en kiu okazis la jubilea 10-a jugoslavia Esperanto-kongreso en Zagrebo. Dum sia Esperanta kariero ŝi estis respondeca redaktoro de la gazeto "La Suda



Stelo" en la malfacilaj jaroj de la rekomenciĝanta movado en Kroatio kaj Zagrebo (1948-1950). Post tio sekvis ŝia engaĝiĝo en la Universala Kongreso de Esperanto, kiu en 1953 okazis en Zagrebo. Laborinte en la redakcio de "Žena", ŝi verkis plurajn artikolojn pri Esperanto (ekz.

pri la Esperantista kampadejo en Primošten), kaj en 1963-64 ŝi publikigis la 12-lecionan Esperanto-kurson. Profesie ŝi akiris en 1956/57 nacian ĵurnalan premion. Ŝi verkis ankaŭ por aliaj Esperantaj gazetoj (ekz. "Tempo") kaj libroj. Per teksto "Gino, Zagrebo kaj lernantino" ŝi kontribuis al "Eseoj memore al Ivo Lapenna" priskribinte sian konatecon kun la korifeo de la postmilita Esperanto-movado en Kroatio. En 1996 ŝi tradukis la unuaktajn "Reveno" de Srdan Tucić, kiu aperis en "Antologio de kroataj unuaktaj dramoj". Jam en respektinda aĝo ŝi partoprenis ankaŭ kongresojn de kroataj esperantistoj. Ŝi estis membrino de Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo. La redakcio de "Zagreba Esperantisto", kies abonanto ŝi estis, esperimas sinceran kondolencan al ŝiaj familianoj.

OSIEK-konferenco 2008

LITERATURE EN SLOVENIO

Post organizado de OSIEK-konferencoj en Motovun (2000) kaj Pécs (2004) la firmao "Orbis Pictus" de Višnja Branković estas komisiita organizi ankaŭ venontjaran konferencan de tiu kultura societo. La konferenco okazos en Slovenio, de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2008 en tre verda, tre nova kaj tre juna urbo Nova Gorica, kiu en 2006 estis proklamita la plej gastama urbo de Slovenio. Ankaŭ la centra festo okaze de la eniro de Slovenio en Eŭropan Union (la 1-an de majo 2004) okazis ĝuste en tiu simbole grava apudlima urbo (SI/IT).

La konataj altnivelaj prelegantoj de IEK en la antaŭ-UKo semajno, pritraktos literaturan temon: "Vivo kaj verko de Ferdinando de Diego".

La konferenceto estos agrabla Studenta hejmo, kun bela ĉirkaŭaĵo, bonaj kondiĉoj kaj prezoj.

La loka organizanto precipe atentigas kaj invitas la kroatajn esperantistojn eluzi la okazon kaj profiti el la proksima valora aranĝo. Bedaŭrinde, kroataj esperantistoj mankis kaj en Motovun kaj en Pécs.

La konferencoj kutime ne estas grandaj, sed tre internaciaj, tiel ke oni povas bone ĝui diversan kulturen kaj distran programon kaj intense komuniki kun interesa partoprenantaro.

Antaŭ la konferenco okazos tuttagaj ekskursoj tra Slovenio, dum post la fermo oni kunvojaĝos al la 93-a UK en Roterdamo.

La informoj troveblas ĉe www.osiek.org kaj riceveblas de la loka organizanto:

ORBIS PICTUS de Višnja Branković
Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio
tel/fax:+39/040 767 875 orbispictus@iol.it



 Radenko Milošević

Vukovar

VERDIKTO EL HAGO

"Kain leviĝis kontraŭ sian fraton Habel, kaj mortigis lin. Kaj la Eternulo diris al Kain: Kie estas via frato Habel? Kaj tiu diris. Mi ne scias; ĉu mi estas gardisto de mia frato? Kaj Li diris: Kion vi faris? la voĉo de la sango de via frato krias al Mi de la tero. Kaj nun estu malbenita de sur la tero, ..." (Gen, 4,8-11)

Oni refreŝigu la memoron! Kiom da homoj estas en Eŭropo kaj en la mondo kiuj rememoras pri la milito en eksa Jugoslavio, la plej brutala milito post la dua mondmilito? Sanga, perforata, mortpafa buĉado, per kiu unu falsa politiko provis havigi al si pecojn de aliaj respublikoj jugoslaviaj. Ja oni scias kiu atakis kaj per amilo provis venki kiun, sed temis pri milito en kiu frato pafis kontraŭ frato. En militunuoj kiuj defendis Kroation estis serboj, eĉ oficiroj altrangaj, kaj same en Serbio – kroatoj estis inter serbaj soldatoj. Multis kazoj kiam frato atakis fraton, kuzo – kuzon!

Kaj venis verdikto el Haga Tribunalo por militkrimoj faritaj en Vukovar kaj 5 kilometrojn malproksima farmobieno Ovčara (= Ŝafejo). La tribunalo verdiktis nur pri Ovčara. Kaj en Vukovar estis mortigitaj 1700 personoj (1100 civiluloj), 4000 estis vunditaj kaj kelkaj miloj da personoj estas malaperintaj. En la koncentrejo Ovčara, dum esplordemandado oni

uzis basbalo-bastonojn, ĉenojn, bastonegoj kaj kolbojn. Krime sur Ovčara kaj Vukovar enhavas aldonajn elementojn: vunditoj kaj malsanuloj estis forkondukitaj el hospitalaj litoj al iama bestfarmo kaj tie murditaj. Tra la koncentrejo Ovčara pasis 3000-4000 personoj, el kiuj estis murditaj 200, kaj 64 personoj ankoraŭ estas konsiderataj malaperintaj.

La "triopo el Ovčara" (Mrkšić, Radić, Šljivančanin) ricevis verdiktojn kiuj estis nekredablaj: inter kvin jaroj da prizono kaj plena liberigo! Ĉu oni povas nun demandi iun (ĉu la tribunalajn juĝistojn?) kie malaperis la Konvencioj de Genevo?

Ambaŭ registaroj, kaj la kroata kaj la serba estas nekontentaj pri tia verdikto. Ne ekzistas kelkaj veroj, sed nur unu VERO.

"Rakontoj el Vukovar" de ĵurnalisto Siniša Glavašević, estas vera historio pri la eventoj dum la atakado de Vukovar. Ni esperantistoj posedas apartan



esperantistan ateston pri tio. Kio okazadis al ni, al esperantistoj dum tiu terura Hejmdifenda milito, speciale en Vukovar? Kio okazadis en tia buĉado kun esperantistoj? En la 2-a numero de "Zagreba Esperantisto" oni trovas, ke Zlatko Brajer el Borovo naselje (parto de Vukovar) estis perforte kondukita al koncentrejo kie li estis mortigita. Kaj ne nur li viktimiĝis. En la libro de Spomenka Štimatec "Kroata milita noktlibro", oni povas legi: "Ĉu la Esperanto klubo? – Jes, bonvolu. – Ĉu mi povas paroli kun vi? Mi estas la onklo de René. De René el Vukovar... René malaperis. Ni serĉas lin per ĉiuj rimedoj... En novembro 1991 li malaperis." Pero Đaković ricevis invilon por aligi al hejmdifendaj soldatoj. Kvin infanojn lasis hejme la doktoro. Jen pri li el la libro: "El iu embusko venis pafoj. La ŝoforo, trafita en la ŝultron ekhurlis: Doktoro elsaltu! Li vidis, ke la doktoro jam sidis morta, trafita de pafoj..."

Kiu scias kiom da esperantistoj falis en la alia militflanko?

Ĉe la fino de la artikolo estus bone kaj trafe, ke mi citu mian profesoron, elstaran scienciston, humaniston kaj verkiston, akademiano Ivan Supek, kiu en sia libro "Falsjuranto ĉe maldekstrularo" ("Krivokletnik na desnici", Bristol, 1980) skribas: "Ni ne forgesu agresojn kontraŭ civitanaj liberecoj, kontraŭ homaj rajtoj kaj nuda vivo, sed ni eltiru el koro ĉiun revengon, ĉar ĝis kiam ni ne etendas manon de reciproka repaciĝo kaj ĝis kiam ni ne priparolos prudente la akumulitajn malfacilaĵojn, la historio ĉiam piedpremos nin."



MEDITERANEANO AŬ SOPIRO AL LA SUDO

✍ Zdravko Seleš

Predrag Matvejević: **MEDITERANEA BREVIERO**

Eldonis: Skonpres kaj Libromondo, Bydgoszcz – Svidniko, 2007.

Esperantigis: Tomasz Chmielik



"*Mediteranea breviero*" inkluziviĝas en la tempon de postmodernismo: kiam oni malkonstruas la limojn, miksis la ĝenrojn, eniras la eraon de esejo-dominado. Fakte, ŝajnas, ke literaturo, anstataŭ kaŝi sin malantaŭ la rolantoj kaj ĝuado de tipoj kaj vivrakontoj, ricevas kiel la dominantajon, la veran voĉon de la aŭtoro: ties (verajn) stilon, scion, spritecon, elokventecon, delogecon. Literaturo fariĝas agrabla babilado de fakulo, kiun ni volonte konus; la literaturistoj ne kaŝas magiecon de sia personeco, anstataŭ en amika rondo, iliaj retorikaj akrobataĵoj okazas antaŭ ni ĉiuj, ni fariĝas iliaj kunkamaradoj en la kafejo aŭ vinkelo. Kaj tie ja ne plu gravas la ĝenroj, eĉ ne la konsekvenceco; gravas la efiko, intereseco, amuzeco ... Ne mirigas pro tio, ke la verko kun tiaj karakterizaĵoj gajnas premiojn kaj estas tradukata al multaj lingvoj; la verko de erudicio kaj ekstravaganco, envido kaj ĝuo, komplekseco kaj specifeco.

Nome, "*Mediteranea breviero*" estas libro temanta pri Mediteraneo, kaj la aŭtoro mem skribis: *"Oni eĉ ne scias kien etendiĝas Mediteraneo, kioman parton de la bordo ĝi ampleksas, kiel ĝi eniras la bordon, en kiu loko ĝi finiĝas, sur la maro kaj surtere. La Helenoj vidis ĝin inter la rivero Fazis sur Kaŭkazo oriente, ĝis la Heraklo-kolonjo en la markolo antaŭ Gibraltaro, okcidente. Tiu norda limo estis akceptata kiel natura, kaj la sudan ili neglektis. Araba saĝo instruadis, ke Mediteraneo penetras tien, kie olivarboj kreskas".* Kaj la alineo finiĝas per: *"Mediteraneo ne estas nur geografio."* Sekvas ĝin: *"Ĝiaj limoj estas markitaj nek per spaco, nek per tempo. Oni ne scias, kiel difini ilin, nek per kio. Ili estas nek ekonomiaj, nek historiaj, nek ŝtataj, nek naciaj: la mediteranea "kretocirklo" fojfoje estas signata kaj forviŝata, ondoj kaj ventoj, aventuroj kaj inspiroj distiras ĝin aŭ malvastigas laŭ sia mezuro. Ĉi tie komenciĝis la vojoj Silka kaj Sukcena. En diversaj direktoj kuris la vojoj de salo kaj spicoj, oleoj kaj parfumoj, ŝtofoj kaj ornamaĵoj, laboriloj kaj armilaro, kapabloj kaj scioj, artoj kaj talentoj. La helenaj empirioj estis ne nur foiroj, sed ankaŭ ambasadejoj. Laŭ la romiaj vojoj kreskis la potenco de la imperio kaj disvastiĝis la civilizo. Mediteraneo ne estas nur historio."* Kaj tiu ĉi finiĝas per *"Ĉe Mediteraneo naskiĝis Eŭropo."*

Kiel lulilo de Eŭropo, fonto de mitoj kaj kialo de sopiro de norduloj al la sudo, Mediteraneo ĉiam estis pribabilata kaj priskribata; la samon faras ankaŭ Predrag Matvejević, sed li ne estas ordinara vojaĝanto kaj vojaĝpriskribanto; lia vojaĝo estas kaj reala kaj imaga: li veturas per ŝipoj kaj per vortoj de antaŭuloj, li veturas mare kaj vortare! Tial, kvankam nur la lasta

parto de la libro nomiĝas "Glosaro", "*Mediteranea breviero*" estas iaspeca vortaro de Mediteraneo, en ĝi estas priskribitaj kaj klarigitaj moleoj, homoj, insuloj, duoninsuloj, havenestroj, ondoj, ventoj, maraj fluoj, bordoj, golfoj, lumturoj, grundoj, bordanoj, sakroj, mezuroj kaj pezoj, bazaroj, salejoj, metioj, ŝipfarado, restaĵoj de dronintaj ŝipoj, riveroj, trinkaĵoj kaj mangajaĵoj, eĉ zumado de cikadoj: ĉio kion homoj asocias kun Mediteraneo.

Ĉar temas pri tro abunda kaj samtempe tro fluida temaro, Matvejević skribas preskaŭ esploriste, fakule, detale, sed samtempe ankaŭ kiel poeto: metaforike, simbolike kaj lirike. Tiel naskiĝas teksto ekster ĝenroj, kompilaĵo de enhavo memorigita el libroj, mapoj, sonĝoj, dokumentoj, rakontoj, scioj kaj misscioj, impresoj...

"*Mediteraneo kaj parolo pri Mediteraneo estas nedisigeblaj unu de la alia.*" - skribis la aŭtoro. Mediteraneanoj kaj multaj aliaj delonge provadas vortumi Mediteraneon. Kaj ĉar Mediteraneanoj ne estas anoj de unu lingvo, de unu nacio kaj konfeso, ili ne perceptas Mediteraneon el unu starpunkto (por Eŭropanoj ĝi estas suda maro, por Afrikanoj la norda...), la vortoj kaj la ideoj pri Mediteraneo estas multaj, similaj kaj diferencaj, ili estas provokaj por la aŭtoro, kiu volis koni Mediteraneon el vidpunkto de ĝiaj observantoj, parolantoj, vivantoj, samkiel por tradukistoj el pli ol dudek lingvoj kiuj gastigis la tekston. Nia, Esperanta, tradukisto Tomasz Chmielik uzis kaj originalan kroatan tekston kaj la tradukojn germanan kaj francan. Predrag Matvejević mem kunlaboris ofte ĉe tradukoj kaj ili estas parte adaptitaj al lingvo kaj kulturo de la traduko; kiam la vortoj estas motivo de la teksto, tiam oni devas malsame reagi al vortoj el diferencaj kulturoj kaj lingvoj. Tial ankaŭ la Esperanta traduko havas siajn specifajojn kaj ĝi verŝajne estis traduka aventuro. Por mi la legado de la Esperanta versio estis nova aventuro pri la jam konata teksto.

Mi konkludu: "*Mediteranea breviero*" estas vigla teksto kaj vivanta teksaĵo, samkia estas la maro kaj ĝiaj bordoj priskribitaj, kiel Mediteraneo,

la unika, sed ĝi ne ekzistas kiel tutaĵo, sed nur kiel imagita mozaiko el pluraj nacioj, rasoj, kulturoj, vivstiloj ... Estante tia, neunueca, plena da diferencoj: suno kaj maro kiuj diversmaniere reflektiĝis sur diversaj insuloj kaj bordoj, ĝi atestas pri riĉeco, kiu per unuecigo (tutmondigo) povus plejparte malaperi. Predrag Matvejević priskribas Mediteraneon, esploras ĝin, malkovras amason da informoj pri ĝi, sed fakte ĉion ĉi li faras pro utilo de la mediteranea mito, plua

mitologiado de Mediteraneo: la mitoj tre evidente altiras Mediteraneon al ni, la malebleco komplete ĝin ekkoni, kaj la ĉarmo de tio kion pri ĝi ni scias, ĉiam forte altiras - aparte Eŭropanojn Hiperboreojn, tiujn kiuj vivas norde de Mediteraneo, loĝantojn de la kontinenta, malvarma parto de Eŭropo. Mediteraneo por ili ĉiam restos sopirataj suno kaj maro; sopiro al la sudo!

Surbaze de la decido farita en la kunsido de la Prezidantaro de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), kiu okazis la 20-an de oktobro 2007 en Rijeka, UPE anonas

KONKURSON

por dezajnado de simbolo (logo) de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto.

La simbolo devas enhavi rekoneblajn elementojn de Esperantomovado kun kombino de la mallongigita titolo de la Unuiĝo (UPE).

Limdato por sendi la konkursaĵojn: 31-a de decembro 2007.

La konkursaĵojn oni devas sendi al prezidantino de UPE: Marija Jerković, Jarunska 6, 10000 Zagreb, aŭ per reto al: mjerkovic@net.hr

La konkursaĵojn prijuĝos tripersona komisiono elektita de UPE.

La konkursaĵo kiun la komisiono elektos kiel simbolon de UPE estos premiita per:

- 1) Semajnfina restado en la bieno Branković (Slavonio)
- 2) Abono al "Zagreba Esperantisto" por 2008
- 3) "Ordeno de Verda Plumo" (Leksikono pri Esperantlingvaj Verkisto).

Kongresaj karavanoj de Orbis Pictus

POST JOKOHAMO - ROTERDAMO!

Okaze de la ĉi-jara 92-a Universala Kongreso en Jokohamo "Orbis Pictus" prizorgis ne grandan (dudekpersonan), sed tre kvalitan kaj internacian grupon de esperantistoj el 8 landoj (devenantaj de 4 kontinentoj).

La oferto estis fleksebla kaj bonpreza, tiel ke ĉiu povis mem finkonstrui sian vojaĝon kaj vidi "sian Japanion". Pli ol triono de la grupanoj elektis ankaŭ postkongresan partoprenon en la 40-a ILEI-konferenco en Ranzan kaj tre ĝuis kaj ĝojis tie en intensa ludado, kantado, lernado, kursado, ekskursado... tra Esperanto kaj la japana regiono Saitama.

La karavanorganizado estas preparanta la venontjara partoprenon en 93-a Universala Kongreso en Roterdamo (de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008), por pli granda kaj pli internacia grupo, kiel kutime, dum eneŭropaj UK-oj.

Pri tio eblos ekscii pli ankaŭ rekte dum la Renkontiĝo en Rijeka, la 17-an de novembro ĉi-jare.

La organizanto rekomendas al interesitoj tuj anonci sin por antaŭrezervi la lokon en la ĉefa "roterdama hejmo de Orbis Pictus": 3-stela hotelo en piedira distanco de la kongresejo. Laŭbezone estos prizorgita ankaŭ loĝado en malpli alta/malplikosta kategorio. Viajn informpetojn kaj sugestojn bonvenigas:

ORBIS PICTUS de Viŝnja Branković
Via Parini 5; IT-34 129 Trieste, Italio
tel/fax:+39/040 767 875; orbispictus@iol.it

Maksimilian Kolbe - Patrono de esperantistoj

✍ Radenko Milošević

Rapide pasas tempo kaj samtempe anakŭ ritmo de nia "Zagreba esperantisto". Materialoj abundas kaj iam ŝajnas al la legantaro, ke ni tro malfruas publikigi ion. Pasis jam du monatoj ekde kiam en Podhum apud havenurbo Rijeka estis celebrita sankta meso omaĝe al la sanktulo Maksilian Kolbe.

Oni ne tro scias pri li nek pri lia sindona ofero. Generale, celebrante sanktulojn, oni starigas demandon kiel iu el ili estis proklamita sanktulo. Kion signifas tiu proklamo kaj kia homo li estis.

Maksimilian Kolbe estis naskita en Pollando en 1894. Enirinta la franciskanan ordon li fariĝis pastro en Romo en 1918. Dufoje li estis enkanterigita (en 1939 kaj 1941). Maksimilian Kolbe estis murdita en la koncentrejo Auschwitz, la 14-an de aŭgusto 1941, kie forpasis multaj homoj, virinoj kaj etaj infanoj - pravuloj kaj senkulpuloj. En la koncentrejo, post mortigo de unu germana soldato, estis mortpunitaj dek malliberuloj, inter ili ankaŭ patro de multinfana familio kiu samtempe estis kun Kolbe en la koncentrejo. Kolbe libervole oferis antstataŭigi tiun homon doninte sian vivon por savi lin. La papo Johano Paŭlo la Dua proklamis lin sanktulo en la jaro 1982.

Nekonate restis, ke Maksimilian Kolbe estas ĉiela patrono de katolikaj esperantistoj. Li en sia tempo favoris Esperanton, kaj tial li presis en Esperanto sian libron "Heroo de Senpekulino". En lia libro estis priskribita lia rilato al familio, komunumo, amikoj kaj al la homaro per propra sindono. Li skribis, ke la plej granda amo estas doni la vivon por sia amiko, por homo. Tiel li per sia ago ĉe la fino de la propra surtera vivo atestis sian kredon en martirado por homo!

PRI LA VALORO KAJ KARAKTERO DE ILEI-DIPLOMO DE LA LJUBLJANAJ KURSOJ (2)

Respondo de ILEI-sekretario

✍ Atilio Orellana Rojas

Pri viaj demandoj rilate al diplomoj disdonitaj de ILEI en la jaro 1986, mi povas informi la jenon: ILEI kunlabore kun la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto kaj tiu en Ljubljana okazigis 2-semestran postdiploman studprogramon destinitan al instruistoj specialiĝi pri Esperanto. Ĝi okazis en la Pedagogia Akademio de la Universitato Edvard

Kardelij en Ljubljana kaj efektiviĝis inter la 24-a de novembro 1984 kaj la 22-a de novembro 1986. La ĉeestintoj devis konfirmi siajn konojn per sukcesa trapaso en 4 kolokvoj pri 4 diversaj fakoj kaj verki disertacion. La sukcesintoj ricevis diplomon de ILEI, per kiu ILEI rajtigis tiun personon uzi la titolon "Internacia Diplomita Esperanto-Pedagogo". Ĉar la sperto ne ripetigis, ILEI ne disdonis denove tiun titolon. Tiu diplomo atestis, do, ke la posedanto scipovis Esperanton. S-ino Marija Beloŝević ĉeestis kaj sukcese trapasis tiun kurson.

Respondo al sinjoro Nikola Rašić pri karaktero de ILEI-diplomo

✍ Julijana Rusić

Antaŭ ol mi respondus al via senargumenta opinio pri karaktero kaj celo de ILEI diplomo, mi devus pardonpeti nian grandan, monde konatan esperantiston, d-ron profesoron Szerdahelyi, kiu bedaŭrinde ne plu vivas, sed kiu neniam mortis en cerboj kaj sentoj de siaj studentoj, poste IPE-diplomintoj. Se vi foje, s-ro Rašić, estus partopreninta en prelego de d-ro prof. Szerdahelyi, vi certe ŝanĝus vian opinion pri karaktero kaj celo de IPE-diplomo. D-ro prof. Szerdahelyi prelegis tiel bele, interese, ekzemploriĉe, ke lin ni aŭskultis sen laciĝo en Ljubljana universitato, de mateno ĝis vespero. Kvankam li travivis du korinfarktojn kaj havis kronikan iskialgion, li senlace vojaĝis 12 horojn en malvarma trajno (-25 gradoj) de

Budapeŝto ĝis Ljubljano. Antaŭ 22 jaroj lia celo estis, ke ankaŭ Jugoslavio havu diplomitajn esperantistojn, internaciajn pedagogojn, kun ILEI-atestilo, kiuj povus disvastigi Esperanton en universitata nivelo al studentoj de diversaj fakultatoj en propra lando kaj en la mondo. Li sukcesis tion realigi: 10 studentoj el Jugoslavio (4 el Kroatio) finis la postdiploman studon en Ljubljano, kaj ricevis IPE-diplomon. Sed li, kaj ankaŭ ni kun IPE-diplomo, ne sukcesis ricevi subtenon de vi kaj kelkaj zagrebaj esperantistoj, kiuj progresigis la "Zagrebano Metodon". Kia domaĝo, kia domaĝo! Se tiuj ideoj estus realiĝintaj antaŭ 22 jaroj, en pluraj eŭropaj landoj, eble hodiaŭ oni parolus en Unuigintaj Nacioj nur Esperante. Mi tiutempe provis ion fari, disvastigi Esperanton, sed la pordoj estis fermitaj antaŭ mi. Marija Beloŝević, kiu tiel iritis vin, havis alian vojon. Kaj ŝi sukcesis. Hodiaŭ, per propono de la Elekta Komisiono de UEA, ŝi eble estas estrarano de UEA. Mi al ŝi kore gratulas!!!

Ni restu seriozaj

✍ Nikola Rašić

Mi praktike plene konsentas kun s-ino Rusić, nur ke ni parolas pri samaj aferoj.

Kompreneble ke mi konis prof.

Szerdahelyi bone, mi ja estis lia asistanto en Ljubljana! Mi admiris lin samkiel pluraj aliaj, kaj ankaŭ mi vojaĝis en frostaj frumatenoj al Ljubljana. Ne temas do pri la sendubaj kvalitoj kaj meritoj de tiu granda homo. Kaj neniam temis pri tio. Mi ne komprenas de kie nun aperas lia persono kvazaŭ estus ia miskompreno pri li.

Mi mem bedaŭras, ke mi neniam ricevis la diplomon, kvankam ĝi estis promesita al mi kiel "honorario" por mia senpaga laboro en Ljubljana. Temis pri brila kurso kiun oni devus kiel eble

plej ofte ripeti. La demando estas: Kion signifas la diplomo kaj kiun rangon ĝi havas?

Kiel s-ro Orellana Rojas diras: ĝi konfirmas ke la persono scipovas Esperanton. Laŭ mi, ĝi pravas multe pli ol tio. Ĝi pravas, ke tiu persono ankaŭ povas instrui Esperanton. En tiu senco mi mem havas grandan estimon por tiu diplomo: ja mi subskribis ĝin mem!

La sola problemo estas kiel interpreti la terminon "internacia pedagogo de Esperanto". Pedagogo estas persono kiu universitate aŭ altlerneje studis pedagogion aŭ almenaŭ havis pedagogiajn fakojn ene de iu alia (precipe instruista) altnivela studo. Laŭ tiu kompreno (kiun, laŭ mi, dividas plej multaj homoj) persono kun finita mezlerneja eduko ne nomiĝu pedagogo. Tio signifus asigni al si titolon kiun oni ne havas. Tio supozigas, ke la persono kiu tiel prezentigas



Dankon pro la sendo de “Zagreba Esperantisto”. Ĝi estas sub ĉiaj aspektoj bonega. Mi, tiom detalema, ne vidas eĉ unusolan kritikindan punkton. Mi eĉ lernis unu vorton: kapitulaco (mi diris “kapitulacio”). En la gazeto aperis bonega novelo, ĉar ĝi vekas emociojn. Ĝi memorigas al mi (pro la tranĉeoj) la romanojn pri la unua mondmilito: de la franca verkisto Henri Barbusse “Le Feu”, de Roland Dorgelès “Les Croix de bois” kaj de la germana Erich Maria Remarque “Im Westen nichts Neues”. Sed ĝi ankaŭ memorigas al mi pri tio kion mi legis hieraŭ (http://www.planetenonviolence.org/D-Hiroshima-a-Bagdad,-61-ans-de-Guerres-a-l-Uranium-Leuren-Moret-Une-Voie-Suicide,-Genocidaire,-Homicidaire_a1263.html) pri uzado de armiloj kun malriĉigita uranio en la mondo. Aŭ: <http://perso.orange.fr/mondanisto/u238.htm>. Nia malfeliĉa tero ! Kiom ĝi suferas pro la homaro! Devus esti ne nur homrajtoj sed ankaŭ terrajtoj, aŭ naturrajtoj... Denove koran gratulon al vi !

Françoise Noireau (Francio)

Daŭrigante ĝui vian kaj nian gazeton “Zagreba Esperantisto”, mi volas abonigi al ĝi ankaŭ mian bulgaran amikon.

Mirjana Žeželj (Zagrebo)

Pri la nova gazeto: probable la plej luksa kaj bela gazeto en Esperantujo kaj kun enhance enviinda nivelo!

Lajčo Imrić (Subotica, Serbio)

Koran dankon pro sendo de du numeroj de via plaĉa revuo.

Lina Gabrielli (Ascoli Piceno, Italio)

Nun en Poznań mi havis tempon trankvile tralegi “Zagreban Esperantiston”. Homoj, ĉu vi konscias, ke vi faris bonegan gazeton. Ĝi plaĉegis al mi. Kaj ne nur al mi. Multaj homoj diris, ke ili ricevis ĝin kaj eĉ legis. Mi vere fieris kvazaŭ mi mem meritus.

Judita Rey-Hudeček (Zagrebo)

Mi provis reagi tra via blogo, sed ŝajnas, ke la adreso menciita en la revuo estas erara aŭ ke estas iu teknika problemo.

Roland Rotsaert (Brugge, Belgio)

Noto de la redakcio:

S-ro Rotsaert pravas. La ĝusta adreso estas: <http://zagreba-esperantisto.blogger.hr>

○ havas pli altan edukon ol li/ŝi efektive havas. Temas do pri - celkonscia aŭ ne - trompo de publiko. Persono kun NUR mezlerneja eduko simple ne estas kaj ne povas nomi sin pedagogo senkonsidere kiajn kaj kiomajn diplomojn oni havas. Almenaŭ tio ne eblas en la ekstera mondo. En tiu mondo diplomo de ILEI ne signifas multe: interalia pro tio, ke ĝi ne aplikas la samajn kriteriojn kiun oni nomu pedagogo.

En Esperantujo regas aliaj leĝoj, kiel ni scias, kaj ĝuste tial Esperanto ne venkas kaj ne venkis.

Eble tial ILEI mem ĉesis la praktikon disdoni tiun belan sed ja iom misgvidan titolon. Ni restu seriozaj kaj ne forgesu la realan kuntekston de mondo en kiu ni vivas. Ni ja scias, ke la mondo ne prenas nin serioze, sed ni malofte konscias kial. Jen unu instrua ekzemplo, tiu pri la diplomo kaj titoloj. Marija Beloŝević simple ne estas pedagogo kaj neniu povas pedagogiĝi ŝin krom ŝi mem per adekvata studkurso. Ĉiuj ja scias tion, ankaŭ Marija.

Mi nur aldonu, ke la studo nomiĝis “postdiploma”. Oni kvazaŭ subkomprenis, ke la personoj partoprenantaj ĝin jam posedas ian pedagogian diplomon. Pri tiu regulo oni ne tro striktis kaj jen de kie miskomprenoj. Ja post ordinara postdiploma studo oni fariĝas magistro de sciencoj (almenaŭ en eksa Jugoslavio). Tio sugestus ne nur ke posedanto de tiu diplomo al si atribuas universitatan nivelon sed eĉ sciencan gradon. Kiel mi diris jam: ni restu seriozaj kaj realismaj.

Surprizas min la aserto, ke iam kaj iamaniere mi mem malhelpis personojn kun tiu

diplomo disvastigi Esperanton.

Mia memoro eble ja rustas sed mi dubas, ke tia aserto iel ajn povus ĝusti. Mi neniam malsubtenis iun ajn disvastigi Esperanton. Des malpli homojn kun diplomo kiun ankaŭ mi mem subskribis. Ĝin povas posedi ankaŭ personoj kiuj uzas la Zagreban Metodon. Ĝi estas nur unu el multaj metodoj, ne la plej bona eble, sed ankaŭ ne inter la plej fuŝaj. Sed kun siaj eldonoj en preskaŭ 30 lingvoj kaj certe pli ol 50 diversaj eldonoj ĝi verŝajne pli kontribuis al disvastigo de Esperanto ol multaj aliaj. Sed tio estas tute alia temo, kiu esence ne gravas por tiu ĉi historio.

Se Marija estus fariĝinta Estrarano de UEA eble ankaŭ mi gratulus ŝin. Mi verŝajne ne gratulus la Elektan Komisionon. En ĝiaj rekomendoj devus regi prudento, kaj tiu ĉi propono montriĝis kiel malprudenta. Tial la tuta cirko, pri kiu mi bedaŭras ke ĝi devintis okazi. Kiel mi jam diris: ni restu seriozaj.

La redakcio

Post plurfoje pritraktita temo, la redakcio opinias, ke estas elĉerpitaj ĉiuj laŭleĝe preskribitaj eblecoj pri ĝustatempa kaj necesa informado pri tiu ĉi temo. Pro tio, per publikigo de la ĉi-numera diskuto, la temo pri ILEI-diplomoj estas fermita. Escepton ni faros nur en kazo, ke Marija Beloŝević, multfoje menciita en diversaj kunteksto, kaj mem neniam respondinta, sentos bezonon reagi.



La 40-a PUPTeatra INTERNACIA FESTIVALO




Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) startis en la jaro 1968 kiel unu el la pluraj internaciaj kulturaj aranĝoj kiujn en diversaj kroataj urboj iniciatis kaj kun granda entuziasmo organizis entreprenemaj membroj de Studenta Esperanto-Klubo (SEK) el Zagrebo. Dum la pasintaj kvar jardekoj el la komence pure esperantisteca, PIF iom post iom transformiĝis al pure pupisma manifestacio kun prestiĝa internacia renomo. Dum la pasintaj jaroj PIF klopodis ĉiujare doni apartan atenton al unuopaj naciaj puplernejoj/akademioj ekz. al la bulgara, franca, pola, rusa, slovaka, ktp. La ĉi-jara, jubilea PIF, kiu okazis de la 31-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro en Zagrebo, estis dediĉita al la kroata pupteatra arto. Tial pli ol duono el la dekkvin partoprenantaj pupteatroj el sep landoj estis kroataj. Aparte agrabla surprizo estis la malferma prezentaĵo kaj la posta sinprezento

de studentoj el la Artakdemio el Osijek, kie en la jaro 2004 komenciĝis regula studo de puparto – la unua en Kroatio. Tamen la Internacia Faka Ĵurio la ĉefpremion "Milan Čeĉuk" tutmerite atribuis al Stuffed Pupteatro el Nederlando por prezentaĵo "Schicklgruber alias Adolf Hitler", dum la Infana Ĵurio decidis, ke la plej bona estis la prezentaĵo "Tri muskedistoj", plenumita de Teatro Alfa el Ĉeĥio.

La jubilea festivalo havis ankaŭ abundan kromprogramon el kiu indas menciigi pupekspozicion "Aŭtora tuŝo en la kroata puparto" en galerio "Forum" kaj la fotoekspozicion "Pupo-homo-PIF" de Ivan Špoljarec en la renoma fotogalerio "Badrov". Okazis ankaŭ tri libroprezentoj, fakaj diskutoj kaj puplaborejo por infanoj kaj gepatroj. Parto de la festivala programo okazis ankaŭ en urbo Sisak kiu en la komencaj jaroj de PIF estis unu el la festivalaj urboj.

De 1972 konstanta organizanto de PIF estas Internacia Kultura Servo kies malgranda teamo kun granda lerto, amo kaj entuziasmo jam 35 jarojn flegas tiun ĉi, en la mondo unikan, amikplenan kaj ĝojoportan festivalon.

Por fruaj abonantoj...



Ĉiuj abonantoj, kies abonpago por 2008 estos registrita ĝis la 31-a de decembro 2007 rekte ĉe la eldonisto aŭ ĉe la perantoj (vidu paĝon 90), ricevos donace ankaŭ la libreton **"Sayonara, Japanio!"** (vojaĝimpresoj), verkitan de Davor Klobučar.

En 2008 - 6 numeroj
Jarabono: 75,00 kunaĵoj / 15,00 eŭroj

... **aparta donaco!**